

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religikompara revuo
 Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques

ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj

Neŭtrale kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista), EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), UTSLE (Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista), OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantistaj Judoj), U. E. A., ŬEA (Ŭon-budhisma Esperantista Asocio). Membro de WCRP (*World Conference on Religion and Peace* / Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), asociita al IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco). Subtenas la Iniciaton por **Unuiĝinta Religiaro** (*United Religions Initiative*), **fondata en junio 2000.**



Ni tutkore salutas la naskiĝon de
Iniciato por Unuiĝinta Religiaro



La jaro de la pilgrimoj : al Romo por la Jubileo,
 al la Sankta Lando por la UK ...kaj al Santiago !

Vorto de la redaktoro

Al la UK-partoprenontoj: bonan pilgrimon en la **Sankta Lando** de almenaŭ kvar religioj (judismo, kristanismo, islamo kaj bahaismo). Ĉiu el vi bonvolu sendi raporton por la kompaktindaj nekongresanoj, inter kiuj la redaktoro. Sed eble mi partoprenetos en alia pilgrimo, al **Santiago de Compostela: kial ne ankaŭ vi?**

En amase ĉeestenda Grésillon jogan kurson denove gvidos Rose-Marie Laveau en aŭgusto.

Mi ĝoje "aklamas", kaj **invitas vin ankaŭ "aklami" la naskiĝon de Unuiĝint-Religiara Iniciato**, la 26-an de junio: do tuj! (p. 9)

Mi ankaŭ **petas recenzontojn** anonci sin.

Fine mi **pardonpetas pri la nur 28 paĝoj** por ne transpasi 100 g, pro duobligita franca suplemento ...kaj aldono de abonilo-aliĝilo!

N.B. Bonvolu laŭeble sendi **viajn artikolojn** ktp. en formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj: *Word Perfect...*) **sur disketoj** (3 1/2), plie de la surpapera kutima formo: tiel mi ŝparos la enkomputiligan retajpadon. Mi ankaŭ povas ricevi ilin fakse (**baldaŭ per la reto?**).

Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado internacia pri spirita kaj teologiaj instruoj) ĉ. trimonata

Red.: Presbytere F-09800 Balagué. Tel/Faks 33 561 047 066

ASISTI-estraro: Prez. Y. Umeda – B. Moro: kasisto (Skrytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle, Pollando)

– Ch. Lavarenne: sekretario kaj vickas. – G. Berveling: eksteraj rilatoj – L. Nordenstorm: Religia Antologio.

Directeur de Publication: Christian Lavarenne

Jarabono: triono de UEA-indivdua abono (MA), t.e. 105ff/35gld/30DM/20\$ (duone por malriĉaj landoj) al:

– CCP *Asistilo*, 1042177R *Marseille* (nur en frankoj!)

– UEA-konto *asis-r*

– FEL-konto *clvr-n*

– B. Moro, Skrytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

Subtena abono: ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 eŭroj

Abonhelpa fonduso: pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevontoj...

ASISTI-kotizo 1998: deviga por esti membro, kiom ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-MJ: 7 eŭroj, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)

Subtena membro: ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40 eŭr.

...Ne forgesu kontribui, koran dankon!

Enhavo

Prezidinto de komisiono pri sektoj kondamnita pro misfamigo, de J.M. Dumay (F)	p. 4
Letero pri antropozofoj, de Marek Krainki (PL/D)	p. 4
<i>Unueco spirita, diverseco noma</i> , de Liang-ĉu-vaj (Ĉinio?)	p. 5
Interesaj respondoj de Claude Piron (fino), de Hokan Lundberg (CH/S)	p. 6
Aklamilo de la naskiĝo de Unuiĝint-Religiara Iniciato, 26-6-2000 (USA)	p. 9
<i>Ci kaj mi kaj ĉiuj animoj estas nur unu en la eterno...</i> , inspirita dum URI-programero (F)	p. 9
Pied-pilgrimo al Santiago de Compostela (29-7 / 2-9-2000), de Rudolf Fischer (A/E)	p. 9
<i>Jogosutro</i> de Patanĝali: la Plenumado, kun komentario de Vjaso (Bharato)	p. 10
<i>La Serĉado de l'Gralo</i> : La kontricio de Lancelot... (el la romanika, 13-a jc.)	p. 12
Bodhidharma / Ta-mo / Daruma, de Brosse, Ross, Suzuki... (F/USA/J)	p. 15
Kiel subteni Sekvojon, mortigotan esperantiston?, de Gary Mickle (D/USA)	p. 16
Kiam fine libera? Mondaj marŝoj por Tibeto; Dalai-Lamao en Francio (Tibeto)	p. 16
300-jariĝo de Valdesanoj en Germanio , de Marek Krainki (PL/D)	p. 17
Kiel rezisti? Kion respondi pri "anticionismo"? , de Patro Armando Zecchin (I)	p. 17
Kiam eblas ekscii ke <i>finiĝas nokto</i> ? (anonima rakonto juda)	p. 17
<i>La Serio pri Gilgameŝ</i> : Malsano de Enkidu (Sepa Tabuleto) (Hitita kaj Nineva)	p. 18
Forpasintoj : Nikkyo Niwano (J), J. Vincent (F), F. Concina (I), pastoro K. Twinn (GB)	p. 21
Interreta dissendo-listo pri persona kaj spirita evoluo, de Marion Belisle (CH)	p. 22
For la religian malamon!, de Ambrose F. Polle (Tanzanio)	p. 22
Sarajeva Interreligia Konsilio, de Mustafa Resuloviĉ (Bosnio)	p. 23
La sankta <i>Kuraano</i> : reeldono, de Bashir Bhatti (Pakistano)	p. 23
<i>Granda Unueca Kredo</i> , ĉapitro 2-a: <i>Mekanismo</i> (fino), de Jebumo (Ĉinio)	p. 24
Infanaj preĝoj, anonimaj kaj de Sophie Bonnevie; kun muziknotoj (H,N)	p. 25
Taoistaj prezentoj en amerika E-kongreso, de Philippe Chavignon (F/Kolombio)	p. 26
Ni bonkore ridu, dank'al letero de Gilbert Ledon (Brazilo)	p. 26
Leteroj : Enriko Marzola (I), pastoro Christian Mazel (F), W.H. Simcock (GB)	p. 27
Ni ricevis: religiaj kaj spirit(ist)aj libroj kaj broŝuroj, kiuj serĉas recenzontojn!	p. 28

Letero de la (taoista) ASISTI-Kasisto

Kedzierzyn-Kozle, la 11-an de Oktobro 1999

~~Kara Christian~~ [ĉefe : **Kara Asistilo-legemulo** (aŭ almenaŭ : -ricevinto)],

(...) Konsiderinte niajn diskutojn pri *Asistilo* kaj financoj [dum la lasta Interreligia Seminario Esperantista, organizita de li], mi supozas ke mi devas ion diri de la vidpunkto de durkapa financisto (estante ja la Kasisto).

Trafis min, ke (...) granda parto de la financa problemo estas pro la fakto ke vi tiom emas disdonaci la revuon, ke ASISTI kaj viaj personaj financoj ne povas facile elteni la malaverecon de tio. Multaj observantoj [el kiuj la *Asistilo*-ricevantoj] povus facile senti ke estus nedezirinda afero se via disdonemo endanĝerigus la daŭran eldonadon de la revuo.

(...) Kompreneble estas ankaŭ nepagpovaj legemuloj, kaj provizi ankaŭ al ili donace aŭ malplimultekoste kreas homan valoron. Tamen nepagantaj *nelegemuloj* estas kategorio forgesinda, al kiu ne valoras provizi la revuon – despli ke tio aktive malhelpas finance.

Sekvante tiujn pensojn, mi supozas ke mi iom deziras ke vi konsideru ĉu ne estas kategorio de **nepagantaj *ne legemuloj***, kies nepluricevo estus neniel vera perdo de homa valoro kaj ŝparus monon al *Asistilo*. Kaj ĉu oni ne povus pli malpli akurate trovi tiun grupon per la **sendado al nepagantaj de respondilo, demandanta ĉu ili ankoraŭ aktive deziras ricevi** senpagajn numerojn. Krom en specialaj kazoj, oni tiam povus ne daŭrigi la sendadon al nerespondintoj. La revuo do povus ŝpari monon por la finance pli sekurigita eldonado de ĝi al veraj interesitoj. Tio do estas mia konsilo.

Bradio V. Moro III

Klarigeto de la redaktoro ...kaj vickasisto

Mi ofte senpage sendadis nian revuon al kiuj ajn petintoj, aŭ al partoprenintoj de la Inter-Religiaj Kunvenoj Esperantistaj dum la Universalaj Kongresoj kaj UEA-fakdeligitoj pri religioj kvankam ili ne petis ĝin. **Eble ankaŭ vi ne komprenas kial vi ricevas ĝin ?**

Ni ne estas sekto, tute male, ĉar nia celo estas *dialogo* kun ĉiuj – inkluzive ne kredantojn –, kaj *neŭtrala* studado pri ĉiaj religioj kaj spiritaj movadoj kaj pri kredado mem ; tamen monon ni minimume bezonas almenaŭ por pagi la "presadon" (fakte la malplikostan fotokopiadon) kaj sendadon. La redaktoro, kiu jam oferas sian tempon, ne plu devu krome oferi ankaŭ sian monon : **elkoran dankon al ĉiuj kiuj jam ekkonsciis kaj sendis sian abonon, fojfoje eĉ subtenan, ...kaj al tiuj kiuj baldaŭ same faros !**

Christian Lavarenne

P.S. Mi ankoraŭ ne finkalkulis por la jaro 1999, sed ĝi probable montros malpli grandan deficiton ol la antaŭa jaro, kies dificito estis ĉ. 2.000 gld (preskaŭ 1.000 eŭroj).

Letero de legonto

Lugufu, la 26-an de marto 2000

Al Sinjoro Christian,

Viajn nomon kaj adreson mi legis en la jarlibro de U.E.A. (...) Leginte vian sciigon mi estis tre kontenta ĉar ĝi multe interesas min, nome : (...) religio kompara. Tial mi petas vin, sendi al ni laŭeble ampleksajn kaj kompletajn informojn pri tio. (...) Atendante vian baldaŭan respondon mi antaŭdankas vin kaj salutas vin tutkore.

Muhindo Karafuli (Tanzanio)

Respondeto : Dankon pro via letero. Jen senpaga ekzemplero de nia revuo. Bonvenon inter ties legantoj, esperante ke vi ŝatos ĝin kaj deziros kontribui, se ne mone, almenaŭ per artikoloj aŭ leteroj. Samideane

Prezidinto de franca komisiono kondamnita pro misfamigo

S-ro J. Guyard [jak güijar], prezidinto de la parlamenta Esplor-Komisiono pri [la financa, poseda kaj fiska situacio de] la sektoj, estis kondamnata, la 21-3-2000, al 20.000-franka mon-puno [ĉ. 3.000 eŭroj] kaj pago [al tri movadoj] de 90.000 FF pro damaĝo [13.700 eŭroj].

Neebleco "sinpravigi per serioza enketo", dokumentoj ne "trafaj" aŭ havantaj "nenian pruvan valoron", "raporto karakterigita per unuflankeco":

La metodoj de la parlamenta esplorkomisiono pri sektoj "ricevis plumberojn en la flugilon" [t.e. estas grave kaj trafe kritikitaj], laŭ lego de la juĝo.

Jus post kiam la esplor-komisiono publikigis sian raporton pri sektoj kaj mono (10-6-1999), s-ro Guyard estis la invitito de la televido France 2:

– "Laŭ kiaj kriterioj tiu ĉi komunumo estis klasifikata sub la kategorian rubrikon "sektoj" ?

– Ĝi estas tipa. Ĉiuj tiuj movadoj estas unue allogaj, kaj poste reveliĝas ke ilia ĉefa celo tamen estas fialproprigi al si monon aŭ altrudi absolutan povon super homoj (...) Tie ĉi estas tute klara doktrina fipersvado." (...)

S-ro Guyard multfoje invokis la "sekretan" karakteron de la laboro de la parlamenta komisiono, malpermesanta, laŭ li, ke li rivelu siajn fontojn.

– "Tio konsistigas multe da sekreto dum estas la intereso de ĉiuj, ekscii kiel tio funkcias !", finfine ekkrietis la prezidantino de la tribunalo.

En sia juĝo, la tribunalo konkludis: "Neeblas ne konstati ke s-ro Guyard elparolis akuzojn dum televida elsendo, kontraŭ movado pri kiu li ne kapablis pruvi ke okazis serioza enketo. El liaj deklaroj evidentiĝas ke li konis nur skribajn atestojn de homoj kiuj diris sin viktimoj de antropozofio, sed ke nek la aŭtoroj de tiuj korespondaĵoj nek la supozitaj respondeculoj de la antropozofia movado estis aŭskultitaj de la komisiono; ke la aliflankeco de la farigita esplorado sumiĝis je nura sendado de skribita demandaro al sesdeko da movadoj rigardataj kiel sektoj." [kaj ĝi listigis 172 "sektojn" !]

"Neniu montrita dokumento estas trafa rilate la akuzojn pri mensa manipulado, financaj premoj, fialproprigo de sumoj, kaj kuracaj praktikoj endanĝerigantaj la vivon de malsanuloj", aldonis la tribunalo, kiu malakceptis kiam ajn pruvan valoron de montrita dokumento de "ĝeneral-informistoj"¹.

Malakceptante la atribuan al s-ro Guyard de la parlamenta imuneco, por kiu pledis la substituito de la prokuroro, la juĝistoj opiniis ke la damaĝo de la civilaj partioj estis "grava (...) pro tio ke la misfamigaj elparoloj estis dirataj de deputito, prezidanto de komisiono pri kies aŭtoritateco kaj kompetenteco ne povis estiĝi dubo ĉe la publiko".

Tiu ĉi juĝo, raportita de J.M. Dumay (23-3-2000) en la ĉi-apuda (mallongigita) artikolo el *Le Monde* (la plej grava kaj serioza franca ĵurnalo), ankoraŭ fortigis mian emon kredi **tute trafa, la demandon de Viv-Etiko** (vidu 24, p. 9) ĉu la komisiono "almenaŭ klopodis kontroli la informojn kiujn ĝi publikigis sub sia nomo, aŭ ĉu ĝi kontentiĝis per arbitraj kaj eraraj asertoj devenantaj de aliaj fontoj";

kaj prava, la aserton ke "tute senbaza kaj sen ia kialo estas la ĉeesto de Vivetiko en raporto pri Sektoj kaj mono", kiel pruvis la 4-paĝa publika letero pri kies enhavo mi povis mem esploreti.

Despli ke tiu internacia eduka iniciato "disvolviĝis en konsultado kun la Eduka Fakto de UNICEF kaj kun la subteno de UNESKO". (Red.)

Letero

7-5-2000

Antaŭ kelkaj monatoj, en regiona gazeto en Poznan, mi legis [vortajn] **atakojn kontraŭ** antaŭlernejo kiun gvidas **antropozoj**. La verkintoj alvokis al elpelo de tiu "sekto".

Cetere, 2 km for de mia nuna loĝloko (Bad Lieberzell, D), situas la vilaĝo Unterlenghardt. Ankaŭ ĉi tie tiu ĉi estas rigardata "fremde alia", pro **antropozoj**. Ili konstruis ian malsanulejon – kelkajn impresajn tipe senangulajn domojn –, organizas koncertojn, prelegojn ktp. Ne al ĉiuj, en tiu ĉi tradicia regiono, plaĉas tia agado.

Tre interesa estis [la lasta ?] balotado. Anstataŭ averaĝe 56 % por CDU (Kristan-Demokratoj) ĉe la ĉirkaŭaj vilaĝoj, nur 25 % en Unterlenghardt; kaj por la Verduloj 37 % anstataŭ 8,4 % ! Ili do **voĉdonis tute malsame** ol la aliaj en la regioneto, ĉefe favore al ekologio.

Estas demando: kio nun estas la antropozofia movado, ĉu sekto, eklezio, religio, ekologia pensmaniero? Kaj kiel forte ili influas en la praktika vivo? La verkaro de Rudolf Steiner [ŝtajner] estas abunda, sed hodiaŭaj homoj ne emas legi. Tamen oni povas observi kiom ili praktike influas.

Marek Krainki

¹ France: *Renseignements Généraux (RG)*, t.e. sekretaj policistoj el ministrejo pri internaj aferoj. Iliaj raportaj dokumentoj estas neniam subskribitaj.

Unueco spirita, diverseco noma

Ĉu ni miru pri fakto specifa al la esperantista medio: la plej rapida kaj facila disvastiĝo, kvazaŭ "per flugiloj de facila vento", de novaj aŭ alie malmulte konataj ideoj aŭ informoj pri novbakitaj aŭ minoritataj spiritaj movadoj? Aliflanke neniu tia movado sukcesis, ĝis nun, amase varbi esperantistojn: ĉu ni samtempe estas kaj pli malfermaj kaj pli prudentaj ol neesperantistoj? Jen kio aperis sur dua paĝo de la neŭtrala *Esperanto*, en marto ...1927.

Estas konata intenco de D-ro Zamenhof ke lia lingvo helpu al pli profunda interkompreniĝo inter homoj diversgentaj, ne nur en praktikaj aferoj, sed ankaŭ en spiritaj. Li deziris krei neŭtralan fundamenton lingvan kaj moralan, sur kiuj povus frate renkontiĝi diverslingvanoj kaj diversreligianoj neniel enmiksante sin en la internajn aferojn de siaj reciprokaj nacioj kaj eklezioj.

Ĝi estis la esenco de tio kion li nomis la "interna ideo de Esperantismo". Laŭ la difino de la Bulonja deklario, estas esperantisto ĉiu kiu uzas la lingvon, tute egale por kiu celo li ĝin utiligas. Sed laŭ la Zamenhofa parolado en Cambridge, estas *idea* esperantisto ĉiu kiu lernis per Esperanto ne nur la gramatikon, sed la koran komprenemon al homoj de aliaj gentoj kaj religioj.

Ke la lingvo de l'Espero disvastigis tiun homan komprenemon en milojn da animoj, tio estas la plej bela floro en la spirita krono de ĝia seminto en la mondon. Efektive nenio estas pli favora al paca rekonstruo de l'homaro ol tiu nova fratema pensmaniero, serĉanta prefere tion kio unuigas, ol tio kio dividas.

Ankaŭ ĝi klarigas la kaŭzon kial la esperantista publiko estas ofte elektita kiel favora varbokampo de orientaj unuecigaj religiaj movadoj. Iliaj apostoloj en Eŭropo baldaŭ konstatis la simpatian komprenemon de la esperantistoj kaj komencis propagandi sufiĉe aktive inter ili.

Ĉie oni amike, eĉ fervore, akceptis ilin, sed nenie ili varbis multajn efektivajn adeptojn. Tiaj movadoj estas nun ĉie konataj per Esperanto, eĉ se ne aliĝis al ĝiaj societoj granda nombro da homoj. Kio malhelpas efektivan aliĝon eĉ inter sinceraj simpatiantoj?

Du kaŭzojn ni notu. Unue multaj homoj apartenas al iu aŭ alia religia aŭ filozofia grupo. Ili ne deziras ŝanĝi sian spiritan domon. Cetere, kial ili ŝanĝus se ilia kredo estas sincera kaj se ili trovis en ĝi la feliĉon, la korkontentigon kaj la inspiron al homa helpemo?

Due, multaj marŝas sur la vojo al lumo per helpo de spirita majstro kies influo, inspiro kaj ekzemplo estas al ili kutime famili[ar]aj. Se oni proponas al ili alian nomon, alian personon, alian kondukanton kiun ili ne konas, ili sentas sin haltigataj.

Preskaŭ ĉiuj tiuj novaj movadoj prezentas al la mondo apartan fondinton kies vivo [ofte] estas admirinda kaj alportis al miloj da homoj ĉirkaŭ si grandan inspiron. Tamen al la ekstera publiko tiuj sanktaj gvidantoj aperas kiel konkurantoj inter si kaj ilia plureco konfuzas multajn homojn.

Se oni profunde ekzamenus iliajn admonojn oni rimarkus ke tia konkurenco tute ne ekzistis en ilia penso kaj ke ili ĉiuj rekomendis al la homaro la saman altiĝon de konscienco kaj oferon de si mem. Iliaj apostoloj pli parolas pri ilia persono ol ili mem eble dezirus kaj ŝatus. Tion klarigas fideleco kaj dankemo. Sed eble ĝi malhelpas iom la celon.

Kio fine plej gravas super ĉio cetera? Certe, ke disvastiĝu tra la mondo tiu nobla spirito de sindono kaj frata komprenemo al ĉiuj sinceraj kredoj. Se tion predikis sankta viro en Ekstrema aŭ en Proksima Oriento, multe pli urĝas disvastigi tiun spiriton ol elvoki diskutojn ĉu li estas Di-sendito aŭ apostolo. En tiuj polemikoj estas facile ofendi aliajn homojn aŭ eĉ kaŭzi novajn dividojn pro diversaj signifoj de vortoj. Prefere oni lasu flanken ĉion kio koncernas *nomojn* kaj oni insistu pri la spirito. Tiel oni helpos unuecon kaj ne dividon restante tute fidela al la inspiro de la sendinto.

Liang-ĉu-vaj

Eble temus pri iom tro idealisma priskribo se oni rekte aplikus ĝin al ĉiuj nuntempaj movadoj, kaj oni prave kontrolu ĉu nenio alia kaŝiĝas sub ĉiam belaj proklamitaj intencoj.

Sed en la lasta numero, sen ia ofenda intenco mi uzis pri pluraj movadoj la vorton *sektoj*, naive opiniante ke nur en Francio la vorto nun enhavas forte mallaŭdan (sub)sencon. Teorie, sed jam nur en scienca uzo, ĝi konservas neŭtralan signifon.

Laŭ la ekzemplo de la partoprenintoj en la kolokvo "Novaj religiaj movadoj kaj sektismaj logikoj" (organizita de la franca asocio pri religia sociologio)*, mi do provos ne plu uzi tiun vorton, tro emocivekan, almenaŭ sen citiloj. (La Red.)

* El kiu rezultis en 1999 la kolektiva verko *Sectes et démocratie*, sub la direktado de F. Champion kaj M. Cohen, de Nacia Centro de Sciencaj Esploradoj.

Interesaj respondoj

■ Ĉu vi ankaŭ kredas je reenkarniĝo?

Jes, mi kredas je reenkarniĝo. Fakte, granda parto de **mia vivo estis direktita de la fakto ke kiel infano mi havis memorojn pri antaŭa vivo, sed neniu kredis min.** Tial mia rilato al la vero estis vere suferiga. Se mi estis sincera, oni diris ke mi mensogas (aŭ fantazias); kaj oni devigis min nei miajn spertojn kaj nomis tion sincereco, dum mi sentis min trompulo. Parte tial mi studis **profundpsikologion.** Sed, se esti tute sincera, mi konfesu, ke tiaj kredoj (ankaŭ pri karmo) ne estas plene stabilaj en mi. Dum plejparto de la tempo mi kredas je ili, sed alvenas momentoj, kiam mi pensas: "ĉio ĉi estas fantazia, deliro, nebla..."

■ Kia estis via antaŭa vivo laŭ la memoroj de via infanperiodo?

Fakte mi havis memorojn pri pluraj antaŭaj vivoj, kiel infano. Sed mi nun ne plu memoras rekte ilin, mi memoras nur miajn tiamajn memorojn, dirojn, pensojn, suferon pri tio, ke ne eblis komuniki kaj esti prenata serioze. La ĵus antaŭa vivo estis kiel tre mizera kaj **malfeliĉa knabo en Ĉinio.** La plej klara memoro estis pri mia morto, sur tegmento, dum iu batalo (ĉu kadre de milito, ĉu de konflikto inter du bandoj, mi ne scias). Mi mortis pro kuglo. Mi estis tre juna, inter 18- kaj 20-jara. Mi supozas ke estis dum la jaroj 1920-aj, sed mi ne havas certecon pri tio, same kiel mi scias nenion pri la loko kvankam kiel infano mi tre bone memoris la detalojn de la ĉirkaŭaĵo.

■ Ĉu, laŭ viaj memoroj, vi ĉiam estis viro dum la enkarniĝoj? – Jes.

■ Ĉu vi havas ideon pri kial nur kelkaj havas memorojn pri antaŭaj vivoj?

Ne. Mi opinias ke normale **oni devus ne memori antaŭan vivon.** Sed sur nia planedo, nenio estas perfekta. Tiu leĝo do ne funkcias centprocente. Homoj kun tia memorado **apartenas al ia eta proporcio da fuŝoj,** aŭ pli ĝuste da tre **neprobablaj kazoj, kiuj troviĝas en ĉia statistikado.** Ŝajnas tamen, ke homoj havas pli da ŝancoj konservi tian memoron, se ili mortis junaj kaj perforte. Ŝajnas ankaŭ ke tiaj memoroj ĝenerale forsvenas post la aĝo de ses jaroj. Tio al mi okazis.

■ Vi diris ke vi multe suferis pro viaj antaŭvivaj memoroj, sed ĉu ili ne ankaŭ donas al vi ion pozitivan?

Mi ne diris ke mi suferis pro miaj antaŭvivaj memoroj. Mi suferis ĉar oni ne volis kredi min kaj trudis al mi konfesi pri mensogo, dum por mi

estis ne elpensajoj sed simpla vero. La sufero rilatas nur al la reago de la medio, ne al la memoroj mem. Ĝin kaŭzis ankaŭ la strangaj opinioj pri la ĉinoj. Ankoraŭ nun, mi sentas ian ekkoleretan reagon, kiam oni nomas orient-azianojn flavaj.

Fakte, granda parto de mia nuna feliĉo ŝuldiĝas al la fakto ke – eĉ se miaj memoroj nun estas nur **memoro de perditaj memoroj,** kaj do tre nebulaj – la **ĝenerala impresoj pri tiu antaŭa vivo** estas pri vivo en tiel suferigaj kaj mizeraj cirkonstancoj, ke kompare kun ĝi, eĉ plej gravaj nunaj malagrablajoj estas nenio. Mi konstante miras, kiel malmulte la homoj en niaj landoj alte taksas sian privilegian situacion. Kaj poste mi komprenas: ili ne havas referencan vivon por kompari.

■ Ĉu vi estas ano de iu religio?

Jes. **Mi estas katoliko.** Sed estas malfacile ne miskomprenigi min tiurilate. La katolika religio estas tre malsama laŭ la lokoj. Ekzemple, la katolikismo en Italio sentiĝas al mi kiel io ege diferenca de tio, al kio mi kutimas. Ĝi estas fakte alia religio. Por mi, katolikismo estas duopa. Ekzistas unu katolikismo oficiala kaj institucia, kun dogmoj, ordonoj de Romo, tuta burokrataro tie kaj ege arbitraj decidoj. Sed **kunekzistas kun ĝi alia katolikismo,** kiu konsistas el ritoj, tradicioj, spirito, maniero kompreni la Ĉielajn realaĵojn, kaj ĉefe el homoj, **kiuj tute ne nepre aprobas la romajn decidojn** kaj arbitran aŭtoritaton. Mi apartenas al tiu neoficiala, nepublika katolikismo (kiel almenaŭ 80% el la katolikoj, kiuj loĝas en mia regiono, kaj eble en la tuta franclingvio).

Kion mi tre ŝatas en la katolika religio, tio estas la **tre alta homa kvalito** de multaj el la pastroj kaj monaĥoj. Mi havas multajn bonegajn amikojn inter ili, kaj ili aperas al mi aparte profundaj, bonkoraj, humilaj homoj. Ankaŭ en la katolika religia literaturo estas multegaj verkoj, kiuj kondukas al pli bona vivo, pli bona kono de Dio. Tial, **kvankam mi ne prenas tre serioze la papon** kaj lian medion, nek la oficiale difinitan katolikan moralon, aŭ regulojn kiel tiun pri pastra senedzineco, **mi restas fidela al la katolika religio,** kiu estas la **religio de mia infanaĝo.**

Kompreneble, ĉar mi kredas je reenkarniĝo, **mi estas iusence herezulo.** Sed mi kredas ke preskaŭ ĉiuj katolikoj estas herezuloj pri io aŭ io alia.

Cetere mi bezonas ritojn kaj partoprenon en la vivo de religia komunumo. Sed mi ne kredas la katolikan pli altvalora. Kelkrilate mi estas **tre proksima al hinduismo kaj budhismo,** ankaŭ al diversaj formoj de animismo kaj ŝamanismo. Mi havas

de Claude Piron (fino)

grandan respekton por bahaanoj. Mi parte apartenas ankaŭ al la **juda tradicio**, kaj forte kunvibras kun ĝi. (Ne kun la plej ortodoksa formo).

Kvankam **mi havas bonegajn rilatojn kun multaj protestantoj** (fakte, mi psikoterapiis plurajn protestantajn pastor(in)ojn), mi tamen sentas protestantismen tro racia, tro intelekta; mankas al ĝi ia mistera, simbola etoso, io malfacile difinebla kion mi trovas en preskaŭ ĉiuj aliaj religioj. Sed protestantismo rapide ŝanĝiĝas tiurilate.

Islamo estas religio kiun mi ne konas kaj kun kiu mi neniam havis kontaktojn (krom unu amiko kies profundan, aŭtentan rilaton al Dio mi ege respektis).

Mi kredas ke **se oni enprofundiĝas en sia religio oni pli kaj pli proksimiĝas spirite al aliaj homoj** kiuj ankaŭ enprofundiĝas en sia religio. Mi sentas min pli proksima al profunda budhano, aŭ al la islamano al kiu mi ĵus aludis, ol al multaj supraĵaj katolikoj, kiuj teorie estas miaj samreligioj.

■ Kion vi pensas pri la homaranismo¹ ?

De tre longe mi legis nenion pri homaranismo sed mi ĉiam plene aprobis ĝin.

■ Kion vi pensas pri Zamenhof ?

Miaopinie, **Zamenhof estis la plenumanto**, verŝajne nekonscia, **de iu aganta sur pli alta nivelo kiun mi emas nomi la *anĝelo Esperanto*** (aŭ *Esperulo* aŭ io simila). Tio ne signifas ke li ne devis multege peni por realigi la ideon kaj perfektigi la projekton. Li devis. Kiam oni estas **inspirata**, oni estas **iel gvidata**, sed devas ege koncentri sin, kaj senĉese rekorektadi sian verkaĵon, por proksimigi ĝin pli kaj pli al tio kion oni sentas kiel *la celon*, difinitan de iu alia ol ni, almenaŭ ol nia ego.

Alivorte, oni havas nebulan senton pri la celataĵo, kaj oni devas iom post iom pliprecizigi ĝin, sciante ke oni neniam plene atingos ĝin. Mi kredas ke tiel Zamenhof agis.

Cetere li estis nekutime **psike matura homo**, kun tre malofta perfekta ekvilibro inter la du duonceroj. Kaj li estis **ege bonkora, honesta kaj humila** (en tre pozitiva senco de tiu vorto), kiuj estas kriterioj de iu kun bonaj rilatoj kun la Ĉielo. Ke li estis **miskomprenata, mokata kaj multe suferis**, tio estas ankaŭ oftaj ĉe tiaj homoj.

Diversaj detaloj de la lingvo igas min kredi ke ĝia vera origino estas superhoma. Ekzemple la "mal"-vortoj, kiuj referencas al bono kiam oni parolas pri io malbona. Aŭ la fakto, ke la parolo de Kristo "*Mi estas la vojo, la vero, la vivo*" sonas kiel belega formulo, kun tia paraleleco inter la si-

laboj, dum certe Zamenhof, nekristano, ne elektis la koncernajn radikojn prepare al la esperantigo de tiu frazo. Simile impresas la fakto ke **amen** en esperanto signifas "**direkte al amo**"; kaj la fakto ke esperanto utilas por faciligi kaj plibonigi la dialogon inter malsimilaj homoj; kaj ke en tiu lingvo **la vorto dialogo sonas ekzakte kiel "dia logo"**. (Dio allogas la homojn al si per sincera, senbara, egaleca dialogo).

■ Kion vi pensas pri la nuna Esperanto-movado ?

Mi ne havas speciale interesajn pensojn pri la **Esperanto-movado**. Mi dirus ke ĝi estas multe pli diversa ol esperantistoj ĝenerale imagas. Ĝi kreis ion iom similan al **diaspora popolo** kiu vivigas la lingvon uzante ĝin kaj verkante en ĝi, kiu analizas la problemojn de lingva komunikado, kaj kiu provas konvinki la ceteran mondon pri la boneco de sia lingvo. Mi kredas ke ĝi, longperspektive, **ĝenerale progresas** (kun sinsekvo de partaj progresoj kaj malprogresoj, kiel en la plimulto el homaj evoluoj) **laŭ la malrapida ritmo de historio, de sociaj fenomenoj, kaj de ege pacienca Dio**, kiu havas eternecon por plenumi siajn projektojn.

En *Heroldo*² aperis mallongigita teksto de prelego mia pri "Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto". (Ĝi povus interesi la legantojn de retkosmo kaj ankaŭ troviĝas ĉe <http://members.aol.com/sylvanz/pirprel.htm>).

■ Ĉu vi ricevis indikojn de la spirita mondo ke vi havas gravan rolon por Esperanto ?

Ne. Sed nun, kiam mi estas 67-jara, kaj reriĝardas al mia vivo, ĝi ŝajnas tiel laŭcele aranĝita por ke ĝi utilu ĉefe al esperanto, ke estas malfacile eviti la konkludon, ke la afero estis organizita de alte. Sinsekvo de hazardoj kaj de decidoj faritaj sen speciala atento al tiu celo faris ke mi atingis malofte renkonteblan nivelon de kompetenteco pri monda lingva komunikado, ĉar mi enprofundiĝis, ne (nur) teorie, sed pro la cirkonstancoj de la vivo, en multaj el ĝiaj aspektoj: ekonomia, politika, socia, psikologia, lingvistika, pedagogia, ktp, dum ĝenerale fakuloj pri lingva komunikado kompetentas pri nur unu aŭ du el tiuj aspektoj, kaj ofte ne pro propra longa laborado surterena.

Alia faktoro kiu igas min akcepti la ideon de **influo de la spirita mondo estas la nekredebla forto kiu puŝas min** al laborado tiukampe. Ek de mia infaneco mi neniam povis ĉesi agi pri kaj por kaj per esperanto. **Oni povus nomi tion obsedo (same pri Zamenhof)**, sed mi estis dufoje longe

psikanalizata, mi ricevis la rajton praktiki psiko-terapion post funda psika esploro, kiu konkludis je mia plena mensa saneco. Laŭ la kutimaj kriterioj mi efektive estas mense sana, kaj ne montras la negativajn aspektojn de patologia obsedo.

Temas do pri io alia, kion mi sentas kiel venantan "de alte". **Tiu forto estas tre intensa, potenca, sed ĝi respektas mian liberecon.** Mi scias ke mi povus diri "ne" al ĝi. Sed plaĉas al mi sekvi ĝin; labori laŭ ĝi igas min feliĉa, kaj ofte esperantistoj kiuj legas miajn verkojn, aŭ aŭskultas min prelegi, poste diras al mi ke mi helpis ilin pli feliĉi.

Tio por mi konfirmas ke **se mi lasas tiun forton puŝi min kien ĝi volas, mi agas laŭ la volo de Dio.** Eble ankaŭ la fakto ke per esperanto mi **neniam gajnis monon**, igas tiun interpreton pli probabla.

Simile, la konstato ke mi sentas nenian apartan fierecon, nenian superecon, pro tiu kompetenteco kaj kapablo feliĉigi, sed **sentas min simpla homo ne pli valora ol la lingve plej sentalenta eterna komencanto**, agas kiel konverĝa probabla faktoro pri tiu maniero vidi mian esperantistan vivon.

■ Ĉu vi estas la verkisto pri kiu vi skribas en la fino de via libro *La bona lingvo*³ ?

Tion mi ne povas scii. Aŭtoro neniam povas juĝi sin. Al mi ne gravas. Mi verkas kiel eble plej honeste, bele, sincere, interese, sed mi estas homo, kaj do tre limigita. Mi ne povas scii kigrade mi atingas la nivelon pri kiu mi aludis en *La bona lingvo*. Tion nur la publiko povas decidi.

■ Kiel vi povas estis tiel certa, ke venos tia verkisto kiam vi priskribas en *La bona lingvo* ?

Mi ne estas centprocente certa. Tio ŝajnas al mi ege probabla, ĉar kiam lingvo vivas tiel vigle, kiel la nuna esperanto, kun diversaj amatoraj verkistoj, la probableco estas granda, ke unu el tiuj estos malpli amatora ol la aliaj. Ankaŭ ĉar estas ekonomia leĝo, ke, kiam estas forta espero pri iu varo, iu finfine produktos kaj ofertos tiun varon. Sed eble mi plene eraras.

■ Mi aŭdis ke vi skribis dikan libron pri lingvistiko kaj esperanto en la franca, ĉu ĝi venos ankaŭ esperante ?

Mia franclingva libro ne temas pri lingvistiko, nur pri la monda lingvo-problemo, kaj esperanto kiel ties plej "mense-sana" solvo. Fakte ĝi estas pli psikologia ol lingvistika. Ĝi grandparte baziĝas sur mia sperto kiel iama tradukisto kaj mia deinterna kono de instituciaj lingvaj servoj, kaj de la ebloj pri lingvoinstruado. Mi ne scias ĉu ĝi iam aperos en esperanto.

Mi komencis traduki ĝin ; sed tio estas tro temporaba laboro. Mi atingis nur la komencon de la dua ĉapitro, kaj tio estis antaŭ tri jaroj. De tiam mi ne plu trovis la tempon labori super ĝi. Mi bezonus almenaŭ tri paralelajn vivojn por fari ĉion kion mi devus fari. Vi trovos tre objektivan recenzon pri tiu li-bro, verkitan de Robert Philippson, profesoro pri lingvoj en la universitato de Roskilde (robert@babel.ruc.dk), kiun mi persone ne konas, en *Language in Society*, 26/1 (1997), pp. 143-147.

■ La plej "mense-sana" solvo vi diris, ĉu tio signifas ke vi kredas je la "fina venko"⁴ ?

Al mi ne tre plaĉas la vorto "venko", kiu elvokas ke iuj gajnas kaj aliaj perdas, kvazaŭ estus superuloj kaj malsuperuloj. Mi kredas ke ĉiuj gajnos per la akcepto de esperanto. Mi kredas ankaŭ ke iam esperanto efektive estos la ĝenerala komunikilo inter malsamlingvanoj. Oni povas antaŭvidi tion, kiel oni povis antaŭvidi la finan alprenon de arabaj / hindaj ciferoj kaj praktikan forlason de la romiaj, kiel oni povis antaŭvidi la forlason de la malnovaj mezurunuoj favore al la pli oportuna decimala kaj metra sistemo. Sed eble mi eraras.

■ Ŝajnas al mi ke viaj sperto kaj kredo vere kongruas kun la *Kosmologio* de Martinus. Ĉu vi interesiĝas pri la verkaro de Martinus ?

Mi scias pri la ekzisto de la verkaro de Martinus, sed ne vere pri ĝia enhavo. Mi interesiĝas pri ĝi se mi disponus pli da tempo, kaj mi ne mirus se ĝi tre kongruus kun miaj kredo kaj sperto.

Se la legantojn interesas scii pli pri miaj ideoj kaj spertoj en la spirita kampo, ili povas demandi.

(Retpoŝte demandis kaj redaktis)

Hokan Lundberg

kun helpo de **Henning von Rosen**

Tre interesaj respondoj de Claude Piron : dankon !
Kris Long (3-1-2000)

(*Notoj de H. Lundberg*)

1/ Homaranismo : la projekto de Zamenhof pri "interhoma filozofio", entreprenata kiel nepra aldono al la "internacia lingvo". Zamenhof verŝajne opiniis ilin ambaŭ same esencaj eroj de estonta tuttera paco.

2/ N-roj 4-5 kaj 6, je 15-4-1998 kaj 30-5-1998.

3/ "La bona lingvo" : libro verkita de Claude Piron, pri la indeco de esperanto el vidpunktoj kaj strukturaj kaj humanismaj.

4/ La "fina venko" : la ideo ke Esperanto fariĝos en ia formo rekonata monda lingvo ; sed la nocio "fina venko", pro historiaj kialoj, foje estas vidata kiel esprimo de fanatikeco, partieceo ks.

Unuiĝint-Religiara Iniciato 72-horaj tutmondaj agadoj

Ne eblas raporti en kelkaj linioj pri ĉiuj 160 agadoj en 42 landoj, kiuj okazis por komenci per paco la jaro 2000, kaj en kiuj partoprenis "pli ol unu miliono da homoj en 400 religiaj komunumoj".

Sed en almenaŭ unu partoprenis **ASISTI-ano** : en Montoire (F), la **31-12-1999**, kunvenis kelkaj amikoj katolikaj, jud(deven)aj kaj brahmakumaraj. Ili silente preĝis aŭ meditadis kaj ĉiu estis invitata skribi kion li sentis ke Dio volas diri al li aŭ ŝi. Jen kion verkis neesperantistino, en formo de letero :

Mia kara dolĉa infano,

Mi scias ke ci vidas cin tia kia cin Mi kreis,
cin kaj ĉiujn animojn sur la tero.

Vi estas Miaj infanoj
kaj vi havas ĉiujn Miajn kvalitojn
kaj posedas amon ;
sed vi fermas viajn okulojn kaj orelojn.

Do, ĉe la ektagiĝo de tiu ĉi nova erao,
eliĝu el via dormemo,
plonĝu ĝis la fundo de via estaĵo,
de via koro kiu batas unisone kun la Mia
kaj kun ĉio kio vivas ;
kaj danku ĉar vi konas tiun belan lumon
kiu brilas kaj prilumigas vian tutan estaĵon.

Mi amas vin, Mi amas vin ĉiujn
per tiu absoluta amo :
tiu kiu estas la vera, la pura kaj la bela.
Kaj ĝojo eksplodos ĉie :
ĝojo, feliĉo kaj beateco.

Mi scias, infano Mia,
ke ci estas plena je bonvolo
kaj preta servi, helpi cian proksimulon ;
kaj ke tio ĉagrenas cin
kiam ci sentas cin limigita.

Sed Mi petas cin :
faru laŭeble plej bone,
kun nealkroĉiĝemo, humileco,
kaj ci baldaŭ vidos ĝermi
la etan semitan grajnon.

Daŭrigu, daŭrigu preĝi, meditadi,
kaj sciu ke ci kaj Mi kaj ĉiuj animoj
estas nur unu en la eterno ;
en Lumo, Paco kaj Amo.

Pilgrimo al Santiago de Compostela

30-7 / 2-9-2000



Bonvolu atenti la ŝanĝon de datoj !

La ekiro de la pilgrimo okazos la **30-an de julio** el **Saint-Jean-Pied-de-Port**, post tranoktado en la tiea pilgrimejo, kiu do servos kiel rendevuejo.

Partoprenos en la tuto almenaŭ du germanaj pilgrimantoj ĝis planita alveno en Santiago de Compostela la 2-an de septembro : s-ro Rudolf Fischer kaj lia 22-jara filo Harald, denaska esperantisto.

Unu **hispana esperantisto** planas akompani ilin dum du aŭ tri tagoj en la regiono de Logroño, kaj **eble** ankaŭ la **ASISTI-sekretario** partoprenos, sed nur ĉe la komenco... Do bonvenon al ĉiuj !

Detalojn pri la pilgrimado oni povas legi ĉe :
<http://medweb.uni-muenster.de/~fischru/jak2000-o.html>. Faksilo de R. Fischer : +49 (0) 25 73 6 26.

URI nun alvokas al simila agado : 72 horoj da Interreligia Preĝado, Praktikado kaj Ceremonio, de la 23-a ĝis 25-a de junio, por celebri ĝia naskiĝo, kaj al subskribado (kaj faksado) de jena deklaro :

Unuiĝint-Religiara Iniciato

Ceremonio de la Ĉart-Subskribo 26-an de junio 2000

Ni, homoj el diversaj religioj, spiritualecoj
kaj indiĝenaj tradicioj en la tuta mondo,
per ĉi tio starigas la Unuiĝint-Religiaran Inicianon
por antaŭenigi daŭran ĉiutagan
interreligian kunlaboradon,
por ĉesigi religie bazitan perforton, kaj
por krei kulturojn de paco, justeco kaj resaniĝo
por la Tero kaj ĉiuj vivantaj estaĵoj.

Mi aklamas la naskiĝon de
Unuiĝint-Religiara Iniciato.

Subskribo :

Urbo :

Lando :

retadreso :

Bonvolu **sendi al ni** vian subskribon aldonotan al la grandega tutmonda subskrib-rulaĵo iniciota dum la Naskiĝ-Tago de Unuiĝint-Religiara Iniciato.

United Religions Initiative, P.O. Box 29242, San Francisco, CA 94129-0242 USA, Faks : +1 415-561-2313.

Retadreso : charter@united-religions.org

Hejmpaĝo : www.united-religions.org

Jogosutro de Patañjali :

द्रष्टा दृशिमात्रः शुद्धोऽपि प्रत्ययानुपश्यः ।

तदर्थ एव दृश्यस्यात्मा ।

कृतार्थं प्रति नष्टमप्यनष्टं तदन्यसाधारणत्वात् ।

draṣṭā dṛśi-mātraḥ śuddho 'pi pratyayānupaśyaḥ // 20 //

tad-artha eva dṛśyasyātmā // 21 //

kṛtārthaṃ prati naṣṭam apy a-naṣṭam tad anya-sādhāraṇatvāt // 22 //

व्याख्यातं दृश्यम् । अथ द्रष्टुः स्वरूपावधारणार्थ-
मिदमारभ्यते—द्रष्टा दृशिमात्रः शुद्धोऽपि प्रत्ययानु-
पश्यः । दृशिमात्र इति दृक्शक्तिरेव विशेषणा-
परामृष्टेत्यर्थः । स पुरुषो बुद्धेः प्रतिसंवेदी, स बुद्धेर्न
सरूपो नात्यन्तं विरूप इति ।

न तावत्सरूपः । कस्मात् ? ज्ञाताज्ञातविषयत्वा-
त्परिणामिनी हि बुद्धिः, तस्याश्च विषयो गवादि-
घटादिश्च ज्ञातश्चाज्ञातश्चेति परिणामित्वं दर्शयति ।
सदा ज्ञातविषयत्वं तु पुरुषस्यापरिणामित्वं परि-
दीपयति । कस्मात् ? न हि बुद्धिश्च नाम पुरुष-
विषयश्च स्यादगृहीता गृहीता चेति सिद्धं पुरुषस्य
सदा ज्ञातविषयत्वं, ततश्चापरिणामित्वमिति ।

अस्तु तर्हि विरूप इति । नात्यन्तं विरूपः ।
कस्मात् ? शुद्धोऽप्यसौ प्रत्ययानुपश्यः । यतः प्रत्ययं
बौद्धमनुवेश्यति तमनुपश्यन्नतदात्मापि तदात्मक इव
प्रत्यवभासते । तथा चोक्तम्—“अपरिणामिनी हि
भोक्तृशक्तिरप्रतिसङ्क्रमा च परिणामिन्यर्थे प्रति-
सङ्क्रान्तेव तद्वृत्तिमनुपतति । तस्याश्च प्राप्त-
चैतन्योपग्रहरूपाया बुद्धिवृत्तेरनुकारमात्रतया बुद्धि-
वृत्त्यविशिष्टा हि ज्ञानवृत्तिरित्याख्यायते” ॥ २० ॥

तदर्थ एव दृश्यस्यात्मा । दृशिरूपस्य पुरुषस्य
कर्मरूपतामापन्नं दृश्यमिति तदर्थ एव दृश्यस्यात्मा
भवति, स्वरूपं भवतीत्यर्थः । तत्स्वरूपं तु पररूपेण
प्रतिलब्धात्मकं भोगापवर्गार्थतायां कृतायां पुरुषेण
न दृश्यत इति । स्वरूपहानादस्य नाशः प्राप्तो न
तु विनश्यति ॥ २१ ॥

vyākhyātaṃ dṛśyam / atha draṣṭuḥ sva-
rūpāvadhāraṇārthaṃ idam ārabhyate : draṣṭā dṛśi-
mātraḥ śuddho 'pi pratyayānupaśyaḥ / dṛśi-mātra
iti dṛk-śaktir eva viśeṣaṇāparāmṛṣṭēty arthaḥ / sa
puruṣo buddheḥ pratisamvedī, sa buddher na-sa-
rūpo nātyantaṃ vi-rūpa iti /

na tāvat sa-rūpaḥ / kasmāt ? jñātājñāta-viśayatvāt
pariṇāminī hi buddhiḥ, tasyāś ca viśayo gavâdi-
ghṛtâdis ca jñātaś câjñātaś cēti pariṇāmitvaṃ
darśayati / sadā jñāta-viśayatvaṃ tu puruṣasyāpa-
riṇāmitvaṃ pari-dīpayati / kasmāt ? na hi buddhiś
ca nāma puruṣa-viśayaś ca syād agrhītā ḡrhītā
cēti siddhaṃ puruṣasya sadā jñāta-viśayatvaṃ,
tataś câpariṇāmitvaṃ iti / (...)

astu tarhi vi-rūpa iti / nātyantaṃ vi-rūpaḥ / kasmāt ?
śuddho 'py asau pratyayānupaśyaḥ / yataḥ praty-
yaṃ bauddham anuveśyati tam anupaśyan na-tad-
ātmāpi tad-ātmaka iva praty-avabhāṣate / tathā
cōktam : "a-pariṇāminī hi bhokṭṛ-śaktir a-prati-
sāṅkramā ca pariṇāminy-arthe pratisāṅkrāntēva tad-
vṛttim anupati / tasyāś ca prāpta-caitanyaōpa-graha-
rūpāyā buddhi-vṛtter anukāra-mātratayā buddhi-
vṛtṭy-aviśiṣṭā hi jñāna-vṛttir ity ākhyāyate" // 20 //

dṛśi-rūpasya puruṣasya karma-rūpa-tām āpannaṃ
dṛśyam iti tad-artha eva dṛśyasyātmā bhavati, sva-
rūpaṃ bhavatīty arthaḥ / tat-sva-rūpaṃ tu para-
rūpeṇa pratilabdhatmakam bhogāpavargārthatāyām
kṛtāyām puruṣeṇa na dṛśyata iti / sva-rūpa-hānād
asya nāśaḥ prāpto na tu vinaśyati // 21 //

Plibonigo de sutrero I,34 (n-ro 18, p. 9). Oni prefere anstataŭigu "de *ellasetado* [kaj] haltigo de la spirajo" per : "de *ambaŭ* [praktikadoj :] *eljetego* [kaj] haltigo de la spirajo"; kaj en la komentario : "*Eljetego* [estas] vomego de la enventra aero tra la naztruoj, kun eksterordinara energio". Pro la sencovasteco de sanskritaj vortoj ankaŭ la antaŭa traduko eblas ; la nova tamen pli proksimas al la propa senco de la radikoj **chjrd* ("eljeti, kraĉi, vomi") kaj **vam* ("vomi") ; kaj se la verbprefikso *pra-* povas signifi "antaŭe" aŭ "antaŭen" (do la movon de *elspirata* aero), ĝi povas ankaŭ signifi "ek-" kaj "-eg" : ĉi-tiu senco plej verŝajnas ĉi-kaze.

II – Ĉapitro de la *plenumado* (sekvo)

(*Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj*)

20. La profunda konscio estas nur vidkapableco. Kvankam pura, ĝi restadas atestanto pri kion ĝi rigardas.
21. La celo, pri kio estas vidata, estas ke tio nur estu vidata.
22. Koncerne tiun kiu atingas liberiĝon, tiaj manifestadoj malaperas, sed ili daŭras por la aliuloj.

(*Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito*)

20. La perceptanto – [kiu estas] nura perceptado –, eĉ pura, perceptas ideojn [aŭ : spertadon].
21. La esenco de la perceptotaĵ[ar]o estas precize [ties] utileco por li.¹
22. Eĉ malaperinta rilate [tiun] kies celo estas atingita, tiu [perceptotaĵaro objektive estas] ne malaperinta pro tio ke la aliaj [daŭre ĝin] kune subtenas.

Sanskrita komentario de Vjaso

20. Oni [jam] pritraktis la percepteblaj[ar]on. Kaj nun oni intencas, ekde ĉi tie, precizigi la propran naturon de la perceptanto : La perceptanto – [kiu estas] nura perceptado –, eĉ pura, perceptas ideojn [aŭ : spertadon].

"Nura perceptado" simple signifas la povon percepti, "ne tuŝatan de atributoj".²

La Spirito sin konas el sia reflektado en la intelekto ; ĝi "ne havas la saman naturon kiel la intelekto, [sed] ne ege malsimilas [al ĝi]".

– Ĝi ne estas samnatura : kial ?

– Ĉar la intelekto ŝanĝiĝadas pro la fakto ke ĝi havas kiel sferon kio estas konata/nekonata ; kaj ĝia sfero (bovino ktp, kaj pota ktp.³), "kaj konata kaj nekonata", montras ŝanĝiĝemecon.

Nu, la fakto ke la sfero [de la Spirito] estas konstante konata [de ĝi], lumegigas la sensanĝecon de la Spirito.

– Kial ? – Ĉar "ne povas ja kaj la intelekto esti nericevanto [de impresoj], kaj la sfero de la Spirito esti ricevanto"⁴ : demonstritaj [estas do] la ĉiamkonateco de la sfero de la Spirito, kaj sekve [ties] sensanĝeco. (...)

– Ĉi-kaze, ĝi estu "malsamnatura" ! [Sed vi diris ke ĝi ankaŭ estas] ne ege malsimila : kial ?

– Tiu, kvankam pura, perceptas sperton [aŭ ideon]. Ĉar la sperto [aŭ ideo] envenas en la intelektan [kampon], [la Spirito do] perceptanta ĝin, kvankam ĝi ne [enhavas] ĉi tiun kiel esencon, ŝajnegas kvazaŭ havi ĉi-ties esencon. Kaj tiel estas dirite :

" Ja *sensanĝa* kaj ne malaperema, la povo de la spertanto, *kvazaŭ* malaperante en la ŝanĝiĝanta objekto, sekvas ĉi-ties movon. Kaj, pro ĝia nura simileco al [tiu] movo de la intelekto, movo kies naturo estas ŝanĝo en la ektrafita konscio, oni diras ke "la movo de la konado ja estas ne distingita de la movo de la intelekto"."

21. "La perceptotaĵo falas en jenan staton : ĝia formo konsistas en ago de la Spirito, kies naturo estas [nura] perceptado [sen esti influita de tiu ĉi]." (...) Sed la propra formo [de la perceptotaĵo] (...), kiam la celo de la forigo de la spertado estas atingita, ne [plu] estas perceptata de la Spirito.

De la neglektado de tiu propra formo [de la perceptotaĵo] venas ties malapero ; sed ĝi ne tute neniigas. – Kial ?

[Al tio respondas la sekva sutro, 22, ĉi-supre.]

Notoj

1/ Ankoraŭ pliaj tradukoj eblas, i.a. tiu elektita de Bangali Baba laŭ alia senco de la vorto *artha* : "Lia celo precize [estas la] esenco de la percepteblaĵo". (**The Yogasūtra of P.*, Delhi, 1990, p. 48)

La traduko akordiĝas kun tiu de Prof. E. Wood : "La esenca naturo de la aĵoj vidataj ekzistas por lia profito". (*Practical yoga*, NY : E.P. Dutton & Co)

Kaj kun la komentario de Sŭamio Sadānanda Sarasūati. (*Yogānuśāsanam*, fr. tr., Paris, 1979, p. 114)

Ĝi cetere alproksimiĝas al la tradicia kristana vidpunkto, laŭ kiu la tuta kreitaro estas farita por la homoj ĉar Dio diris, en *Genezo* 1,26 kaj 28, ke "ili regu super" la vivantoj kaj "submetu la teron".

2/ Ekzemple : percepti malĝojon ĉe iu sen fariĝi mem malĝoja, aŭ malamon sen reage malami lin.

3/ Probable ŝablona esprimo kiu signifas la tutan realon, dividitan en vivantojn kaj senvivaĵojn.

4/ Ĉar la sferoj de la Spirito [*puruṣa*] kaj de la "naturo" [*prakṛiti*] estas tute apartaj, laŭ postulato de la Sankhja filozofio, la teoria bazo de jogo : nenio povas influi la Spirito(j)n, eterne libera(j)n kaj absoluta(j)n ; kvankam estas ĝenerale konsentite ke la inverso eblas : la Spirito nevole influas, ekzemple la homon, senfare altirante lian animon kiel magneto la feron.

La Serĉado de l'Sankta Gralo :

[125,26] " Lors entra en la reine Guenievre, qui ne s'ert pas bien fete confesse puis que ele entra primes en mariage, et l'esmut a ce qu'ele te resgarda volontiers tant come tu demoras en son ostel, le jor que tu fus chevaliers. Quant tu veis qu'ele te resgarda, si i pensas ; et maintenant te feri li anemis d'un de ses darz a desouvert, si durement qu'il te fist chanceler.

Chanceler te fist il, si qu'il te fist guenchir fors de droite voie et entrer en cele que tu n'avoies onques coneue : ce fu en la voie de luxure, ce fu en la voie qui gaste cors et ame si merueilleusement que nus nel puët tres bien savoir qui essaié ne l'a.

La malbona vojo

Des lors te toli li anemis la veue. Car si tost come tu eus tes eulz eschaufez de l'ardor de luxure, maintenant enchaças humilité et atresis orgueil et vousis aler teste levee ausi fierement come un lyon, et deis en ton cuer que tu ne devoies riens prisier ne ne priseroies ja mes, se tu n'avoies ta volenté de cele que tu veoies si bele.

Quant li anemis, qui ot toutes les paroles si tost come la langue les a dites, conut que tu pechoies mortellement en pensee et en volenté, si entra lors toz dedenz toi, et en fist aler celui que tu avoies si longuement ostelé.

Einsi te perdi Nostre Sires, qui t'avoit norri et escreu et garni de toutes bones vertuz, et t'avoit si haut levé que en son servise t'avoit mis. Si que quant il cuida que tu fusses ses serjanz et le servisses des biens que il t'avoit prestez, tu le lessas maintenant, si que quant tu deus estre serjanz Jhesucrist tu devenis serjanz au deable, et meis en toi tant des vertuz de l'anemi com Nostre Sires i avoit mis des soes.

Car contre virginité et chasteé herberjas tu luxure, qui confont l'une et l'autre ; et contre humilité receus tu orgueil, come cil qui ne prisoit nul hom avers soi. Après enchaças toutes les autres vertuz que je t'ai nommees et acoillis celes qui contreres lor estoient.

Et neporec Nostre Sires avoit mis tant de bien en toi qu'il ne pooit estre que de cele grant plenté n'i eust aucune chose de remanant. De cel remanant que Diex te lessa as tu fetes les granz proescs par les estranges terres, dont toz li monz parole. Or gardes que tu peusses puis avoir fet, se tu eusses toutes ces vertuz sauvees en toi (que Nostre Sires i avoit mises)*.

" Tiam li eniĝis en la reĝinon Ginevro – kiu ne bone igis sin konfesprenigata post kiam ŝi unue eniris en edzinecon – kaj ŝin movis volonte rigardi cin tiom longe kiom ci restadis en ŝia domo, la tagon kiam ci estiĝis kavaliro. Kiam ci vidis ke ŝi rigardas cin, tiam ci pensis pri ŝi ; kaj tuj la malamiko cin frapis per unu el siaj ĵetlancoj ĉe la vunda loko, tiel krude ke li ŝancelis cin.

Cin ŝancelis li tiel ke li igis cin dekliniĝi de la rekta vojo kaj eniri en tiun kiun ci neniam konis : tio estis en la vojon de voluptamo, tio estis en la vojon kiu koruptas korpon kaj animon tiel mirinde ke povas tre bone scii tion neniun kiu ne provis ĝin.

De tiam la malamiko forprenis de ci la vidon. Ĉar tiel frue kiel ciaj okuloj estis varmigataj de la ardo de voluptamo, tuj ci forpelis humilecon kaj altiris orgojlon kaj volis paŝi kun kapo malklinita, kaj diris en cia koro ke ion ci ne devas ŝati nek iam ŝatos, se ci ne plenumos cian volon pri tiu kiun ci vidas tiel bela.

Kiam la malamiko, kiu aŭdas ĉiujn parolojn tuj kiam la lango diras ilin, eksciis ke ci morte pekas en penso kaj en volo, tiam li eniĝis tute ene de ci, kaj forigis tiun kiun ci tiel longe gastigis.

Tiel cin perdis Nia Sinjoro, kiu estis cin nutranta kaj elkreskiginta, kaj ekipinta per ĉiuj bonaj virtoj, kaj cin levinta tiel alte ke en sian servon li cin metis. Tiel ke, kiam li kredis ke ci estas lia servisto kaj lin servas per la bonoj kiujn li pruntedonis al ci, ci tuj forlasis lin tiel ke, dum ci devintus esti servisto de Jesukristo, ci fariĝis servisto de l' diablo kaj metis en cin tiom da "virtoj" de l' malamiko kiom da la siaj Nia Sinjoro estis tien metinta.

Ĉar anstataŭ virgineco kaj ĉasteco ci gastigis voluptamon, kiu venkas ambaŭ ; kaj anstataŭ humileco ci ricevis orgojlon, kiel iu kiu ŝatas neniun homon kompare al si. Poste ci forpelis ĉiujn aliajn virtojn kiujn mi nomis al ci kaj akceptis tiujn kiuj estas iliaj maloj.

Kaj tamen, Nia Sinjoro estis metinta en cin tiom da bono, ke ne povis esti ke, el tiu granda abundo, estas nenio restanta. Dank'al tiu restaĵo kiun Dio al ci lasis, ci faris en la fremdaj regionoj la grandajn prodajojn pri kiuj la tuta mondo parolas: Nu, rigardu kion ci povintus poste fari se ci savintus en ci ĉiujn tiujn ĉi virtojn (kiujn Nia Sinjoro tien metis)*.

* La parenteza frazero mankas en pluraj manuskriptoj kaj povas do esti rigardata kiel (necesita) aldonaĵo.

XII – La kontricio de Lancelot

Tu n'eusses mie failli a achever les aventures dou Saint Graal, dont tuit li autre sont ore en peine, ainz en eusses tant mené a fin com nus hons, sanz le Verai Chevalier, porroit fere ; li oil ne te fussent pas avuglé devant la face ton Seignor, ainz le veisses apertement.

Et toutes ces choses t'ai je dites por ce que je sui dolenz que tu ies si maubailliz et honiz que ja mes en leu ou tu viegnes n'avras honor, ainz te diront vilanie tuit cil qui la verité savront coment il t'est avenu en la Queste.

Et neporquant tu n'as mie tant meserré que tu ne puisses trover pardon, se tu cries de bon cuer merci a Celui qui t'avoit si hautement garni et t'avoit apelé a son servise. Mes se tu nel fesoies de bon cuer, je ne te lo mie que tu ailles avant en ceste Queste. Car bien saches que nus n'i est entrez qui sanz honte s'em parte, se il n'est veraielement confés. Car la Queste n'est mie de terrianes choses, mes de celestielx ; et qui ou ciel velt entrer orz et vilains, il en est trebuchiez si felonnesement qu'il s'en sent a toz les jorz de sa vie.

Ausi est de cels qui en ceste Queste sont entré ort et conchié des vices terriens, qu'il ne savront tenir ne voies ne sentiers, ainz iront foloiant par les estranges terres. Si est ore avenue la semblance de l'Evangile, la ou ele dit :

Parabolo de la nuptofesto

" Il fu jadis uns preudoms riches qui ot apareillié a fere noces et semont ses amis et ses parenz et ses voisins. Quant les tables furent mises, si envia ses messages a cels qu'il avoit semons et lor manda qu'il venissent, car tout ert prest.

Cil targierent et demorerent tant qu'il ennoia au preudome. Quant il vit qu'il ne vendroient pas, si dist a ses serjanz :

'Alez de ci et tornez par mi les rues et par mi les chemins et dites as privez et as estranges, et as povres et as riches, qu'il viegnent mengier, car les tables sont mises et tout est prest.'

Cil firent le comandement lor seignor et en amenerent tant avec aux que la meson fu pleine. Quant il furent tuit assis, li sires regarda entre les autres ; si vit un home qui n'ert pas vestuz de robe de noces. Il vint a lui et li dist :

'Biax amis, que queistes vos ceanz ?

– Sire, g'i vign ausi come li autre.

– Par foi, fist li sires, non feistes : car il sont venu plein de joie et de feste et vestu com len doit venir a noces. Mes vos n'i avez aporté nule chose qui apartaigne a feste.'

Ci ne malsukcesintus plenumi la aventurojn de l' Sankta Gralo, por kiuj ĉiuj aliaj nun penas, sed kondukintus tiom da ili ĝis [ilia bona] fino, kiom neniŭ homo, krom la Vera Kavaliro, povus fari ; ciaj okuloj ne estintus blindigataj antaŭ la vizaĝo de cia Sinjoro sed ci lin vidintus malkaŝe.

Kaj ĉiujn tiujn aferojn mi diris al ci pro tio ke mi estas afliktita ke ci iras tiel misregita kaj makulita ke neniam en loko kien ci alvenos ci havos honoron, sed al ci diros malbonaĵon ĉiuj kiuj scios la veron pri kio okazis al ci en la Serĉado.

Kaj tamen ci ne misvagis tiom ke ci ne povos trovi pardonon se ci krios por kompato el bona koro al Tiu kiu tiel alte ekipis cin kaj cin vokis al sia servo. Sed se ci ne farus tion el bona koro, mi ne konsilas cin iri antaŭen en tiu ĉi Serĉado. Ĉar bone eksciŭ ke eniris en ĝin neniŭ kiu el ĝi foriras sen honto se li ne estas vere konfesprenigita. Ĉar la Serĉado ne estas pri teraj aĵoj sed pri ĉielaj ; kaj kiu en la ĉielon volas eniri abomena kaj morale malbela, li estas forfaligata el ĝi tiel senkompate ke li tion [post]sentas dum ĉiuj tagoj de sia vivo.

Tiel estas, pri kiuj en tiun ĉi Serĉadon eniris abomenaj kaj makulitaj de la teraj malvirtoj, ke ili ne scipovos teni sin sur vojoj nek padoj, sed delirante iros tra la fremdaj regionoj. Tiel nun alvenis la parabolo de la Evangelio, tie kie ĝi diras :

Iam estis riĉa noblulo kiu estis preparinta por fari nupton, kaj invitinta siajn amikojn kaj siajn parencojn kaj siajn najbarojn. Kiam la tabloj estis starigitaj, tiam li sendis mesaĝojn al tiuj kiujn li estis invitinta kaj petis ilin veni, ĉar ĉio estis preta.

Tiuj prokrastis kaj restadis tiom longe ke tio ĉagrenis la noblulon. Kiam li ekkonsciis ke ili ne venos, tiam li diris al siaj servistoj :

'Iru kaj cirkulu laŭlonge de la stratoj kaj de la vojoj, kaj diru al la samurbanoj kaj al la fremduloj, kaj al la malriĉuloj kaj al la riĉuloj, ke ili venu manĝi ĉar la tabloj estas starigitaj kaj ĉio estas preta.'

Tiuj faris laŭ la ordono de sia sinjoro kaj alkondukis tiom da ili kun si, ke la domo estis plena. Kiam ili estis ĉiuj sidantaj, la sinjoro rigardis inter la aliaj ; tiam li vidis homon kiu ne estis vestita per nuptofesta robo. Li venis al li kaj diris :

'Bela amiko, kion vi serĉas ĉi tie ?

– Sinjoro, mi venis tiel kiel la aliaj.

– Je mia fido, diris la sinjoro, tion vi ne faris : ĉar ili venis plenaj je ĝojo kaj festo, kaj vestitaj kiel oni devas veni al nupto. Sed vi tien alportis nenian aĵon kiu apartenas al festo.'

Maintenant le fist giter de son ostel et dist, oiant toz cels qui as tables seoient, qu'il avoit semons dis tanz de gent qu'il n'avoit venu a ses noces ; dont len puet veraiement dire que mout i a des apelez et poi des esleuz."

Cele semblance dont l'evangile parole poons nos veoir en ceste Queste. Car par les noces qu'il fist crier poons nos entendre la table dou Saint Graal, ou li preudome mengeront, li verai chevalier, cels que Nostre Sires trovera vestuz de robes de noces, ce est de bones graces et de bones vertuz que Diex preste a cels qui le servent. Mes cels qu'il trovera desgarniz et desnuez de veraie confession et de bones oeuvres ne voudra il pas recevoir, ainz les fera giter de la compaignie des autres, si qu'il recevront autant de honte et de vergoigne come li autre recevront d'onor."

A tant se test et resgarde Lancelot, qui plore si durement come s'il veist devant lui morte la riens el monde que il plus amast, come cil qui tant est dolenz qu'il ne set que il doie devenir. Et quant i l'a grant piece resgardé, il li demande s'il avoit esté confés puis qu'il entra en la Queste. Et il respont a peine et dit oïl ; si li conte tout son estre (...)

Quant li preudons ot ce qu'il li dit, si li dist : 'Lancelot, je te requier sor la cestienté que tu as et sus l'ordre de chevalerie que tu receus ja a lonc tens que tu me dies laquel vie te plest plus, ou cele que tu eus jadis ou cele ou tu es novelement entrez.

– Sire, je vos di sor mon criator que cest novel estre me plest cent tanz plus que li autres ne fist onques, ne ja mes tant come je vive n'en quier partir por aventure qui aviegne.

– Or ne t'esmaier donc, *fet li preudons*. Car se Nostre Sires voit que tu li requieres pardon de bon cuer, il t'envoiera tant de grace que tu li seras temples et ostel et qu'il se herbergera dedenz toi.'

En tiex paroles trespassemblerent le jor. Et quant la nuiz fu venue, si mengierent pain et burent cervoise qu'il troverent en l'ermitage. Puis alerent couchier (...) et dormirent petit, car il pensoient assez plus as celestielx choses que as terriennes.

Au matin li preudons (...) dist qu'il ne s'empartiroit ja mes jor de sa vie, ainz il serviroit son signor celestiel tot son aage. Et quant il vit que Lancelot volt prendre ses armes, il li dist :

'Lancelot, je vos comant (...) que tant come vos seroiz en ceste Queste ne mengiez de char ne ne bevez de vin, et alez toz jorz ou mostier oïr le servise de Nostre Seignor, se vos estes en leu que vos le puissiez fere.'

Et il reçoit cest comandement (...) Et quant il est apareilliez, il prent ses armes et monte et demande congié au preudome. Et cil li done volentiers.

Tuj li forpeligis lin el sia domo kaj diris, tiel ke aŭdis ĉiuj kiuj sidis ĉe la tabloj, ke li estis invitinta dekoble [pli] da homoj ol kiom venis al lia nupto ; el kio oni povas vere diri ke estas multe da vokitaj kaj malmulte da elektitaj."

Tiun parabolon pri kiu la evangelio parolas, ni povas vidi en tiu ĉi Serĉado. Ĉar sub la nupto kiun li proklamigis ni povas kompreni la tablon de l' Sankta Gralo, kie la nobluloj manĝos, la veraj kavaliroj, tiuj kiujn Nia Sinjoro trovos vestitaj per nuptorobo, tio estas per bonaj gracoj kaj per bonaj virtoj kiujn Dio pruntedonas al kiuj lin servas. Sed kiujn li trovos neekipitaj kaj neprovizitaj per vera konfeso kaj per bonaj agoj, tiujn li ne volos akcepti sed forpeligos ilin el la kompanio de la aliaj, tiel ke ili ricevos tiom da honto kaj da malgloro kiom da honoro ricevos la aliaj."

Longe li silentas kaj rigardas Lanceloton kiu ploras tiel amare kiel se li vidus mortinta antaŭ si la personon kiun li plej amas en la mondo, kiel iu kiu estas tiom afliktita ke li ne scias kio li devas fariĝi. Kaj post kiam li longe rigardis lin, li demandas al li ĉu li faris konfeson post kiam li eniris en la Serĉadon. Kaj li pene respondas kaj diras jes ; tiam li rakontas al li sian tutan staton (...)

Kiam la noblulo aŭdas kion li diras al li, tiam li diras al li : "Lancelot, mi cin petegas je la kristaneco kiun ci havas kaj je la kavaliro ordeno kiun ci ricevis jam antaŭ longa tempo, ke ci diru al mi kiu vivo pli plaĉas al ci : aŭ tiu kiun ci havis iam, aŭ tiu en kiun ci nove eniris.

– Sinjoro, mi diras al vi, je mia kreinto, ke tiu nova stato plaĉas al mi centoble [pli] ol la alia iam plaĉis al mi, kaj ke neniam, tiom longe kiom mi vivos, mi volas forlasi ĝin pro aventuro kiu okazus.

– Nu, ne timu, diras la noblulo. Ĉar se Nia Sinjoro vidas ke ci petas pardonon de li el bona koro, li sendos al ci tiom da graco ke ci estos por li templo kaj domo, kaj ke li gastos ene de ci."

Per tiaj paroloj ili finis la tagon. Kaj kiam la nokto alvenis, tiam ili manĝis panon kaj trinkis bieron kiujn ili trovis en la ermitejo. Poste ili iris kuŝiĝi (...) kaj malgrande dormis ĉar ili pensis multe pli pri la ĉielajoj ol pri la teraĵoj.

Matene la noblulo (...) diris ke li neniam foriros el la ermitejo, sed ke li servos sian ĉielan sinjoron dum sia tuta vivo. Kaj kiam li vidis ke Lancelot volas preni siajn armilojn, li diris al li :

"Lancelot, mi ordonas al vi (...) ke tiom longe kiom vi estos en tiu Serĉado, vi ne manĝu viandon nek trinku vinon kaj iru ĉiun tagon al la monaĥejo aŭdi la servon de Nia Sinjoro, se vi estas en loko kie vi povas tion fari." Kaj tiu akceptas la ordonon (...) Kaj kiam li estas preta, li prenas siajn armilojn kaj surĉevaliĝas kaj petas de la noblulo la forpermeson. Kaj tiu volonte ĝin donas al li.

Bodhidharmo / Ta-mo / Daruma

En januaro okazas **Foiro de Bodhidharmo-pupoj** ĉe la templo *Daruma-dera* en Takasaki. Ĝi estas la plej granda foiro en sia speco : la Bodhidharmo-pupoj el Takasaki okupas 80 % de la jara produktaro de tiu pupo en tuta Japanio.

Bodhidharmo-pupo reprezentas hindan budhisman pastron, kiu **fondis zen-budhismon en Ĉinio**. Legendo rakontas ke li perdis la brakojn kaj krurojn post 9 jaroj da meditado¹. Tial la pupo estas ronda kaj ĝia bazo estas peza tiel ke, se ĝi falas pro akcidento, ĝi tuj restariĝas.²

Krom la brakoj kaj la kruroj, la pupo komence malhavas pupilojn : ĝiaj okuloj restas nepentritaj. Aĉetinte novan Bodhidharmo-pupon komence de la jaro, oni mem pentras unu okulon, esprimante deziron en la koro, ekzemple deziron pri sukceso en ekzameno aŭ konkurso. Kaj se la deziro efektiviĝas oni pentras la alian okulon kun dankemo.

絵・木村妙子

Ilustraĵo kaj tuta ĉi-supra artikolo, senditaj de Ljo. (Fonto : *La Revuo Orienta*.)



1. Tiu ĉi legendo probable estas transformiĝo de jena **pli antikva legendo** :

Jam ĵus alveninte en Kantono tiu krudulo malplaĉis per sia rekta verdiremo. Al la imperiestro kiu demandis lin kun modesteco kaj respekto, la hinda majstro respondis nur per impertinentaĵoj kaj, anstataŭ prediki, fuĝis al la nordo.

Tie, rifuĝinte en groto, li restadis senmove, silente, kun la vizaĝo direktita al la muro, meditante dum naŭ jaroj, obstine rifuzante la aspirantojn, krom se ili sinoferu ; tion, laŭ legendo, faris Hui-kho, kiu tranĉis sian maldekstran brakon antaŭ la groto, surneĝe, kaj ĝin alportis al Bodhidharmo kiu finfine akceptis sin turni al li. Poste li faros el Hui-kho sian posteluon, la 2^{an} patriarkon.

Kaj J. Brosse, ia franca **zenmajstro**, ŝerce komentarias : "Ĉu li vere tranĉis sian brakon, degutigantan sangon sur la neĝon ? Tio estas memkompreneble dubinda kaj eĉ fakte nebla (mi tion provis) [!]. (...) Li ne devis tranĉi unu el siaj brakoj sed rompi kun sia pasinto, sia menso de intelektulo."³

2. Estas konate ke la instruantoj de zeno, en Japanio, utiligas tiun pupon por komprenigi al la pezkapulaj Okcidentanoj, ke la konscio ne necese havas sian sidejon en la cerbo, kaj ke bona ekvilibro ne dependas nur de "bone ordigita kapo". (Nancy Wilson Ross, Enkonduko al "Humuro en zeno", en *The World of zen*, New York : Random House, 1960.)

3. *Zen et Occident*, eld. Albin Michel, 1992, p. 101 :

Se oni pli malpli konsentas pri la dato de la alveno de Bodhidharmo en Kantono, ĉ. 520, oni ne konas lian originon. Ĉu li estis monaĥo veninta el Persio, kiel oni antaŭe hipotezis⁴ ; aŭ Suda Bharatano, la tria filo de brahmana reĝo [?] de Kāñĉī-pura, konvertiĝinta al budhismo kaj fariĝinta monaĥo, kio tamen estas pli verŝajna ? Oni konas la datojn nek de lia naskiĝo nek, kio estas pli stranga, de lia morto.⁵

Laŭ la tradicio, **lia majstro, Praĝnādhāra**, la **27^a patriarko de dhjāna**⁶, ordonis al li atendi 60 jarojn antaŭ ol iri al Ĉinio ; per tio oni probable komprenu ke li lasis lin foriri nur ĉi-tiom aĝa. Ĉu li mortis 150-jara, venenita de siaj malamikoj ?

Ĉu li reiris, rigardante sian mision plenumita, al sia origina lando ? La ĉina pilgrimulo Sung Yun laŭdire **renkontis lin, post lia morto**, sur lia vojo returne, kun nur unu sandalo. Li mem, hejmen reveninte, rakontis al la disĉiploj lian renkonton. Oni malfermis la tombon de Bodhidharmo : malplena, ĝi enhavis nur unu sandalon... (J. Brosse, p. 100.)


4. Pro lia ĉina nomo *Tamo*, iuj eĉ konfuzis lin kun S-ta Tomaso, la krista apostolo de Hindio. (Vd en L. Gaillard S.J., *Croix et Swastika*, Chang-Hai, 1893.)

5. *Bodhi-Dharma* venis el Suda Bharato ; lia alveno en Ĉinion okazis, laŭ la historiistoj, inter 486 kaj 527 p.K. Mi opinias, kun Kai-su, kiu vivis dum regado de la Sung-dinastio, aŭtoro de iu "Eseo pri la ortodoksa transdonado de la Dharmo", ke li venis en Ĉinion en 520 kaj mortis en 528. (D.T. Suzuki, *The Zen Doctrine of No Mind*, noto de la unua paĝo.)

6. Sanskrita vorto signifanta meditado/kontempladon, el kiu devenas la japana *zen*, pere de la ĉina.

Monaĥo iam petis Majstron, ke li helpu lin respondi al la malnova demando : "Kion signifas la alveno de Bodhidharmo el la Okcidento ?" La Majstro konsilis al la monaĥo ke, antaŭ ol profundiĝi la temon, li kliniĝegu antaŭ li. Kaj dum tiu ĉi estis respektoplene klinita, la Majstro donis al li **fortan piedbaton** – kiu subite neniigis la dubojn de la monaĥo kaj okazigis al li tujan iluminiĝon.

Poste li diros : "Ekde kiam mi ricevis la piedbaton de Ma-Tsu, mi ne povis ĉesi ridi." (ref. de 2)



Homrajtoj

Kiam fine libera ?

La situacio de la nun 24-jara monaĥino **Ngaŭang Sangdrol**, kiu jam pasis pli ol la triono el sia vivo en malliberejo [vd 24, p. 4-5], ankoraŭ ne pliboniĝis. Kaj se la maljuste pezaj verdiktoj tute aplikiĝos sen ia mildiĝo, ĉi-kaze tio signifus ke ŝi **eĉ ne atingis la duonon de sia prizona tempo.**

Ankaŭ "ni insiste petas tujan kaj senkondiĉan **liberigon de Ngaŭang Sangdrol**", kun Amnestio Internacia (1 Easton Street, London WC1X 8DJ).

Mondaj marŝoj por Tibeto

Por la antaŭenigo de homrajtoj kaj de malperforto, por la protektado de (religia) kulturo, minacata per detruo, kaj por la libereco de popolo, okazas aŭ okazos 3 marŝoj: en Bharato, en Usono ĝis la 24-a de junio, kaj en Eŭropo **tra Alpoj.**

En ĉi tiu partoprenos grupo da 50 marŝantoj, eŭropaj kaj tibetaj, el kiuj la fratino de la Dalai-Lamao (de **Chamonix, la 16-an de aŭgusto**, ĝis la alveno en **Genève, la 26-an**), kaj la respektinda monaĥo Palden Gjatso, kiu travivis 33 jarojn da prizono kaj torturoj (kaj kies rememoroj ĵus aperis en la franca: *Le feu sous la neige* ["Fajro sub neĝo"], eld. Actes Sud).

Kelkaj etapoj povos gastigi ĝis 200 homojn, sed subtenantoj kaj partoprenantoj kiuj aliĝos survoje estu memzorgantoj pri manĝo kaj dormo. La foriro okazos **la 9-an de julio, el Nico.**

Kontakto: "La Transalpine Tibétaine", Ass. *La Marche du Tigre*, 6 rue Marius Gonin, F-69005 Lyon. (Vi povas skribi, ankaŭ en esperanto.)

"Kiel budhistaj praktikantoj, vi devas kompreni la necesecon protekti tibetan budhismon. Kaj por tio, la tero, la fizika lando Tibeto estas decidiga elemento. Estas dube ĉu Tibeto povos transvivi kiel spirita kaj konkreta realaĵo se ĝi estas fizike subpremata sub la ĉina jugo. En tiu ĉi senco, la aktiva subteno al la tibeta afero ne estas nura politikaĵo: ĝi estas Dharma laboro."
(La Dalai-Lamao, en 1993 en Usono.)

La Dalai-Lamao en Francio

De 20 ĝis 24-9-2000 en Lodève (Hérault), lia instruado temos pri "Vojoj al Vekiĝo". Li ankaŭ respondos la demandojn de la partoprenantoj, kaj fine donos iniciadon de *Padma-sambhava*.

Por informoj bonvolu rekte skribi (en la franca aŭ angla), ne forgesante aldoni koverton afrankitan por 50 gr (4 F 50 ene de Francio), al Ass. "Golfe du Lion", 8 rue de la Bouquerie, F-34700 Lodève, Francio.

Kiel subteni Sek ojon ?

Karaj, Berlin, 1-4-2000

Tiel mi okupiĝis pri la afero de N.I. Sequoyah (Billy Waldon) dum iom da tempo pasintjare:

Mi legis diversajn raportetojn [parte reproduktitajn en n-ro 23, p. 12] kaj ektimis ke homoj entreprenos ian agadon sen antaŭe akiri la necesan scion pri la konkretaĵoj de la afero.

Min perturbis ke ne eblas pritaksi:

- je kiuj krimoj Sekvojo precize estas akuzita;
- kiel taksu la demandon de lia (sen)kulpeco;
- (...) kaj ĉu la esperantistoj povas iel helpi al li.

La lasta informo estas pasintsomera: William Harmon, kalifornia esperantisto kiuj okupiĝis pri la afero kaj ankaŭ konas Sekvojon (li vizitis lin en malliberejo), diris ke planata estas revizio antaŭ supera (aŭ simple alia) kortumo kaj ke ne estus sence entrepreni agadon favore al li antaŭ tiu revizio.

Bedaŭrinde mi ne scias kia estas lia kunlaboro kun siaj advokatoj (kio estis problemo okaze de la 1^a proceso), nek pri la argumentoj kiujn ili proponos: ĉu tiuj rilatos al la demando de lia afera kulpeco, ĉu al lia psika stato kaj kulpokapablo.

(...) Laŭ mia impresio neniu esperantisto en Eŭropo havas informojn pri la nuna progreso de la afero. Ŝajnas ke ankaŭ la kaliforniaj esperantistoj ne nepre estas ĝisdate informitaj.

Pro la korespondado ligita kun tio mi estis menciita kiel unu el la homoj kiuj okupiĝas pri la kazo.

La problemo estas ke mi simple ne plu havas temon por okupiĝi pri la afero (...) Mi transprenis tiom da taskoj, promesis tiom da aferoj al homoj, ke ne eblas enigi ion plian en mian agendon.

Kompreneble, se tio helpus, mi povus transdoni iun ajn diskonigon de vi al la *Berlina Informilo* (aŭ al la interreta diskutlisto de la berlinaj esperantistoj), por ke vi povu serĉi alian kiu helpu.

El usona vortaro mi havas la informon:

"Sequoyah (ĉ. 1760-1843), ĉeroka klerulo kaj gvidanto, kreinto de la ĉeroka silabaro".

Mi bedaŭras ke mi ne povas helpi pli konkrete sed esperas ke almenaŭ io de mi skribita ĉi tie utilas al vi. Kun amikaj salutoj, **Gary Mickle**

Se iu volas korespondi kun li, aŭ pri la faktoj de la proceso, aŭ pri la vivo prizona, aŭ pri ajna temo, **bonvolu rekte kontaktiĝi kun li:**

N. I. Sequoyah (B. Waldon),
P.O. Box H27800, Tamal CA 94974 USA
(Nepre skribu *ambaŭ* nomojn !)

300-jariĝo de Valdesanoj en Germanio

Oni devus pli precize diri : piemontanaj valdesanoj* ; ĉar aliaj pli frue vivis en Germanio, jam en la XII-XIII-aj jc., kaj estis fine elradikigitaj en 1480 ; kaj ni scias ke, sange persekutitaj ankaŭ en Francio kaj Italio, de tempo al tempo ili serĉis transvivi alilande, ekzemple en Germanio (1685).

Sed en 1698-1701, pro sangaj persekutoj en Piemonto, amase migris la Valdesanoj, kaj ili loĝiĝis en Suda Germanio.

Nun okazas en eks-valdesanaj vilaĝoj multaj renkontiĝoj por rememori kaj festi tiun eventon. Aperis libreto de Germana Valdesana Organizo, kun bonvortoj de Germana Hugenota Organizo. La jubileo komenciĝis la 1-11-1998 kaj daŭros ĝis la 17-9-2000, ĉefe en Bade-Würtemberg, kaj Hessen.



Mia edzino devenas de valdesana pastora familio (Bellon) de Abriès*, kaj ni loĝas apud fama valdesana vilaĝo, Neuhengstet. Ni do partoprenis tie en porokaza renkontiĝo (la 22-an de februaro).

Partoprenis la nederlanda historiisto Albert de Longe, kiu edziĝis kun valdesana pastorino el Torre Pellice (Piemonto). Antaŭ pli ol 120 homoj en la plenplena salono de la tiea kulturdomo, li parolis pri la batalo de la vilaĝanoj por konservi sian kulturon, ĉar en 1824 la valdesana eklezio estis desupre enkorpigita en la landa evangelia eklezio.

Aktivis tiutempe la franca instruisto Perrots († 1853) – kaj la posteuloj de liaj 11 gefiloj sidis inter la aŭskultantoj. Li serĉis helpon eĉ en Parizo.

La **propra lingvo** (la "valdesana ŝvaba") ne sukcesis travivi la unuan mondmiliton, sed ankoraŭ nun ekzistas restoj de valdesana eklezio (ekzemple en Karlsruhe); kaj restas tombejoj kun specialaj ŝtonoj (kun surskribaĵo *Lux lucet in tenebris*: "**Lu-mo lumas en tenebroj**"), valdesanaj restoracioj, valdesanaj manĝaĵoj, valdesana pano en valdesanoma panejo...

Marek Krainksi

* Ĉu ne : Cabrières ? (Bad Lieberzell, 1-3-2000)

Kiel rezisti? Kion respondi?

Vigle diskutas antaŭ la lerneja pordo liceanoj kiuj iam estis miaj mezlernejanoj. "*Saluton, liceanoj ! (...) Denove vi refalas en antisemitismon*

– ...Ne trompu vin kaj nin, profesoro ! Ni ne estas antisemitaj. Eble hebreoj mem ne plu semitas : ni estas anticionistoj !

– *Vi mokas holokaŭston kaj montras malsentemon*

– ...Ni ne primokas, ni estas primokataj ! Cionistoj, kun siaj lokaj peristoj, faras nin eterne plorantaj pro holokaŭsto, kvazaŭ ne okazus aliaj genocidoj, eĉ pli gravaj. Ni volas ankaŭ pri ĉiuj plori.

(...) Dum ni ploras ili influas nian pensmanieron, enigis siajn politikojn (...) Nin tenante en ploro, ne senkulpigita, ili nin enkondukas en sian mond-rigardon, laŭ skemoj allogaj por ni, frukto-donaj por ili (...) Per la holokaŭsto cionismo nin kolonias (...) Lerta reĝisorado obskurigas iujn eventojn por elmerĝigi nur aliajn (...)

– *Ju pli vi parolas, des pli da mitecaj akuzoj.*

– Ni ne rifuzas plori, aŭ respekti la ŝohahon, sed judoj devus plori kun ni, eĉ penti kun siaj persekutantoj ĉar eĉ iliaj prauloj persekutis, ĝis holokaŭstigi la loĝantojn de la tero, armile konkerita, kie fluis lakto kaj mielo (...) Ili, eble la unuaj, tion faris subŝirme de aroganta Dio, bildigita laŭ ilia volo elimini la rezistantojn kontraŭ la juda invado (...) Nazioj, kun sia "God mit uns", imitis hebreojn.

– *...Kaj la reciproka pardono kiam eblas ?*

– Kiam oni inklinos al historia vero, kaj kune oni ploros ĉiujn viktimojn.

– *Viaj ideoj bezonus pruvojn. Tamen kio interesas, estas via sentumo kaj reagemo ...Mi lasas vin lernejeniri. Saluton !"* **Armando Zecchin**

Rabeno demandis siajn studantojn : kiam eblas eksciĝi ke *finiĝas nokto* kaj ke tago komenciĝas ?

Studanto proponas : kiam eblas distingi inter olivarbo kaj daktilujo.

Ne, la rabeno respondas, ne pro tio.

Alia studanto diras : kiam eblas diferencigi hundon kaj lupon.

Ankoraŭ ne, la rabeno diras, sed tio estas kiam, **unufoje renkontante nekonatulon ci rekonas en li fraton, fratinnon**. Antaŭ tiam, kia ajn estus la heleco de la suno, la tago ankoraŭ ne leviĝis.

* La aŭtoro skribis : *waldensoj*, kaj PIV : *Valdo* ; fakte tiu laŭPIVa" herezulo", naskiĝinta ĉ. 1140, havis kiel nomon *Valdens(is)* aŭ *Valdes(ius)* en la latina, kaj *Vaudès*, *Valdès* aŭ *Valdo* aŭ *De Vaux* (kiu tre probable prononciĝis *de vaŭls*) en la franca. Do en 5 kazoj el 6, estas *s* fine de la radiko, dum la *n* aperas nur unufoje, eĉ se oni retrovas ĝin en la germana. Mi do preferas *Valdeso* kaj *Valdesanoj*, des pli ke en esperanto oni povus konfuzi *Valdenso*-n kun "val-denso". (Red.)

La Serio pri Gilgameŝ :

(En la jena Tabuleto oni retrovas la duan parton de "III. Tabulo" de Kalocsay, sed en tute alia konteksto.)

Venis la tagiĝo,
kaj Enkidu alparolis Gilgameŝon :
"Jenan songon kiun dum la nokto faris mi, aŭskultu.
Anu, Enlil, Ea kaj Ŝamaŝ' la ĉielulo [interkonsiliĝis].
Kaj al Enlil diris Anu : "Gilgameŝ' kaj Enkidu'
mortigis la ĉielan Virbovegon kaj Huŭaŭon ;
nu, pro tio, Anu diris, tiu, ja el la du,
kiu la Cedreg-Montaron ŝtelsenigis, tiu devas morti!"
Sed Enlil' respondis : "Enkidu' ja (eble) devas morti,
sed Gilgameŝ ne !"
Ŝamaŝ' la ĉielul' respondis tiam al Enlil-la-prodo :
"Ĉu ne laŭ ordonoj miaj
ili buĉis la ĉielan Virbovegon kaj Huŭaŭon ?
Nu, ĉu li, senkulpa Enkidu', do devas morti ?"
Sed Enlil' sin turnis kun kolero al Ŝamaŝ' la ĉielulo :
"Tiel ĉi parolas ci ĉar kiel unu el iliaj kamaradoj
ci kun ili ĉiam rekuniĝas, ĉiutage !" "

Enkidu' do kuŝis (ja malsana) antaŭ Gilgameŝ',
ĉe kiu fluis larmoj, (kaj lin diris) :
"Frato mia, kara frato mia ! Oni volas
forkonduki min el mia frato !" Kaj ankoraŭ :
"Estas mi transloĝigota do tre baldaŭ ĉe l'Mortintoj,
mi transpasos de la Mort' la sojlon kaj neniam plu
mi vidos, per okuloj miaj, mian karan fraton !" ¹

(...) (Ĉu respondo de Gilgameŝ mankas ? Eble tiam
Enkidu' momente svenas ? Ŝajnas al mi ke li ekdeliras.)

Enkidu' la bu[ŝon malferminte]
[kaj ekparolante]
alparolis [Gilgameŝon] :
"Ek, a[miko],
[iru ni al Nipur] !" (Kvazaŭ estus li) ĉe l'enirej'
[de l' templo de Enlil' (?)],
la Pordo [kiun li el cedro faris por la di' (?)]
[aperis ĉe okuloj liaj]
(...)
[La okulojn] (do) levante
[(kvazaŭ) al ĝi (?)],
Enkidu' p[ar]olis al la Pordo
kvazaŭ [al vivanto (?)] :
"Ci, ho Pordo, deveninte el l' Arbar',
me[moron] ci ne havas !
Nek inteligento (nek konscio)
<en> ci estas !
Serĉadante cian lignon
(mi travagis) ducent kilometrojn,
ĝis mi trovis
la plej altan el la cedroj !

Cia ligno
estas senegala (...) :
altan je tridek ses metroj, dekdu metrojn larĝan,
duonmetron dikan,
kun pivotoj cial, centra, supra kaj malsupra,
[ĉiu po ses metrojn longa],
cin elfaris mi ;
cin mi transportis a[l la Templo de Enlil' en Nipur]!
Se mi sciis, Pordo,
[kiajn "rekompenson"]
kaj "bon fa[ron"]
[cia di' rezervis al mi (?)],
Mi levintus mian hakilegon
por cin dispecigi :
per disro[mpitaĵoj cial]
ja ŝarĝintus mi la floson ! (...)
Kaj cin tamen mi elfaris, Pordo !
Mi cin portis [al Nipur] :
[ci ne plurestu],
[male kion (?)] ci deziras !
Reĝ' estonta cin ma<lbe> nu !
Dio (...) [cin eĉ neniigu(?)] !
(Sur ci gravuritan) nomon mian aliul' forviŝu,
(por) la sian skribi !"
Kaj [vestaĵojn siajn (?)] forŝirante
li disjetis ilin [teren (?)].

Kiam Gilgameŝ' ĉi tiujn vortojn aŭdis,
tute haste, (kvazaŭ) [e]ĥe, li respondis,
dum li, pro diraĵoj tiaj,
[lasis fl]ui siajn larmojn.
Li, la buŝon malferminte kaj ekparolante,
alparolis Enkiduon : "(Ci,) [amiko] mia,
(kies) [men]so (estas) vas[ta] kaj lucida,
(ci, kutime tiel) prudentega,
[ci parolis] senpripense !
Ki[al] cia koro diris
tiajn sensencaĵojn ?
[Estis (cia) song' bo]nega,
(eĉ se cia) timo (pro ĝi) estas granda
[kaj z]um[igas cialn lipojn] kvazaŭ mu[ŝoj] !
[Eĉ se mu]lte [da angoro]j havas ci],
perfekta estas (cia) songo !
(Ĉar) [la dioj] (nur) al b[on]fartant']
inspiras anks[iecon] :
bonfartanton tiu [songo] an[gorigis] !
Nu, (por ci) petegas mi la [grandajn] diojn !
Iros mi viziti cian (protektantan) dion
kaj [lin] alparolos,
(...)
(lin,) [Enli]l', la patron de la [grandaj] dioj !

malsano de Enkidu (7-a Tabuleto)

Kaj, por ke Enlil', la Suvereno,
c[fin kompa]tu,
ne ŝparante [o]ron,
mi elfaros (anstataŭan) bil[don] de ci !
Zorgojn al ci ne plu faru (mem) [,amiko mia,]
la oraĵ' [efikos bone (?)] !
[Kio] estas ordonita de [Enli]l',
ne estas kiel [diro de ŝanĝiĝemulo (?)] :
Li ne ŝanĝas nek nuligas (?)
[kion] li ordonis !
[Kion li] decidis iam,
li ne ŝanĝas nek nuligas (?),
ho, amiko mia ! (...)
Tiel ĉi destin' ilia venas al la homoj !"

Kiam brilis
iom da mateno,
Enkidu', [levante] sian kapon al Ŝamaŝ',
ekplo[ris] antaŭ li :
[Sub la] radioj fa[jraj] de Ŝamaŝ'
flugadis [liaj] larmoj :
"[Mi prezentas min al ci, Ŝamaŝ',]
[ĉ]ar la Destino estas al mi <ma> lamika !
(Tiu eĉ) ne ĉasist(aĉ)o
kaj (fi)kaptilisto,
kiu min ne lasis plu simila
al amikoj miaj (de la stepo),
(ankaŭ) li ne estu (plu) simila
al amikoj siaj :
(ja,) pr[ofi]to l[ia] estu amputata,
lia gajn' malgrandigata ! (...)
(Ja,) anstataŭ fali (en kaptilojn liajn),
male, ĉiuj bestoj fuĝu kiel nubo (?) !"

[Kiam] estis li ĝissate
malbeninta la [Ĉ]asiston,
al li venis la dezir' malbeni
[ankaŭ] la [Hetaj]ron Laĝojiga !
"[N]u (do) ! Laĝojiga,
al ci atribuu mi destinon,
mi mem atribuu al ci ja
destinon :
poreterna sort' senĉesa,
Kontraŭ ci eldiru mi
malbenon (plej) potencan,
kiu cin ataku
[kiel eble plej] rapide !
Ne(k) feliĉa viv' kun edzo
(iam) es[tos cia] ;
ne(k) ci (iam) konos la kortuŝan emociion
de [ka]res' tenera (?) [al infanoj ciaj (?)] ;
ne(k) [ci (iam) estos ak]ceptita
(kiel) juna belulin' [harema] !

[La biera feĉo]
malpurigos [cian be]lan [bruston] !
[Per vomajo sia ebriuloj]
ŝprucmakulos [cian tualeton] !
(...)
Ci neniam povos uzi
[la enhavon (?)] de parfumflakonoj
(ĉar) la brila [m]on', riĉaĵ' kaj gloro de la mond',
ĉe ci ne restos longe !
[La plej pla]ĉa el la restadlokoj ciaj
estos antaŭ cia pord',
vivejo cia : la kvartalo de l' potistoj²,
restadejo cia : [nur la bordoj] de la vojo !
Ci loĝados [en soleco plena],
ci vegetos en la ombro de l' muregoj !³
(Ci) piedojn ciajn vundos
(je) [la vepro] kaj la dornoj] !
[Ebriuloj kaj d]rinkegemuloj batos cin !
[Surstrate] oni bleke cin insultos !
(Eĉ) la masonist' rifuzos mallikigi
[la tegmenton de domaĉo] cia (?) !
[Ĉe ci (?)] en[lo]ĝiĝos la noktuo !
[Ĉe ci (?)] (ja) neniam [oni festenad]os !
(...)
[Kaj de cia sin' la enirej'
senĉese estos makulata (?)]
(...)
Ĉar libera (estis mi,)
(kaj) ci min [igis sekvi] cin]
[ja kvazaŭ (?)] post ed[zino] mia,
kaj ci (tiel) min [da]maĝis (?) !"

Kiam Ŝamaŝ' aŭdis
la [di]raĵon (de Enkidu),
tuj, de l' supro de l' ĉielo,
li abrupte al[parolis] lin :
"(Nu) kial (do), Enkidu,
ci malbenis la Hetajron Laĝojiga,
kiu cin ja nutris per nutraĵo dia,
cin malsoifigis per trinkaĵo reĝa,
vestis cin per vesto vasta, kaj al ci havigis
Gilgameŝon, ja kunul' perfekta !
Ĉu do por ci [n]un ne estas li
amiko, vera frato ?

1/Ĝis nun : laŭ tabuleta ero de la hitita versio.
Post la klariga parentezo : kutima nineva versio.

2/Tiu ĉi verso estas aldono de unu manuskripto.

3/Komparu kun Raĥab, la "malĉastistino" (en Josuo 2,15) kies "domo estis en la muro de la urbo, kaj [kiu] loĝis en la muro".

Li cin ripozigos sur mal-eta lito,
 li cin sternos sur kuŝej' agrabla,
 preparinte ĉe maldekstro sia
 nmoveblan lokon !
 [Ĉiuj Prin]coj de la land'
 piedojn ciajn venos kisi ;
 la loĝantojn de Uruk'
 li [igos pl]ori kaj lamenti pri ci ;
 por ci igos li funebri
 [la plej glor]ajn el regatoj (siaj) !
 [Li mem] post ci (- cia morto -)
 taŭzos siajn harojn,
 [kaj vest]ita nur per lionfelo,
 li vagados en la stepo !"

[Tuj post (?)] kiam li
 Ŝamaŝ-la-prodon aŭdis,
 lia kolerego
 kvietigis,
 [lia] furiozo (...)
 [tute (?)] malaperis.
 "[Nu (do), Laĝojiga
 [al ci atribuu mi destinon] !
 [Mia buŝo kiu cin mal]benis,
 [cin] retroe ben[os] !
 Princoj kaj [regis]toj
 iĝos (ja) aman[toj ciaj] !
 [(Jam,) dek kilometrojn for (de ci),]
 femuron sian oni batos (pro senpacienco) ;
 [dudek kilometrojn for (de ci),]
 hararon sian oni skuos (pro deziro) ;
 la soldato [sen atendi plu,]
 malvinktos sian portepeton !
 [Estos prodigataj al ci]
 oro, lazurŝtonoj kaj obsidienoj !
 Kiu faros al ci la donacon
 [de valoraj o]raj [orelringoj],
 [sur ĉi ties kampoj] pluv' (abunda) [falos],
 kaj ĉi ties rikoltaĵoj amasiĝos !
 Oni enkondukos cin
 [ĝis en la templo] de la dioj !
 [Por ci] la edzino [estos f]orlasita,
 (eĉ) patrin' de sep infanoj !"

[Tamen (?)] Enk]idu'
 malfortikiĝis.
 Li, duonkuŝante,
 tute sola, (sur la lit'),
 [klarigis] al amiko sia
 ĉion kio premis lian koron :
 "[Ho amiko mia] dum (ĉi-)nokto
 mi (denove) songis :
 la ĉielo [muĝis],
 kaj la tero eĥis (al ĝi),
 dum mi staris
 inter ili !

[(Tie estis) viro, sola],
 kun vizaĝ' malhela,
 kun maskego sama
 [kiel la Anz]u-a,
 [kun lionpiedsimilaj ma]noj,
 (kaj) kun ungoj kiel aglaj krifoj.
 [Min kaptinte je la haroj]
 firme li min tenis.
 (Se) mi volis ba[ti] lin, li saltis,
 [kiel (oni lude) ŝ]nur(saltadas) ;
 sed li, kiam li min batis,
 li min ĵetis teren (...),
 kaj min tr[etis]
 kiel uro.
 De li, [mia tu]ta korp'
 ĉirkaŭpremata estis.
 (Kvankam mi kriegis :) "Savu min, amiko mia !",
 [ci ne hel]pis [min] !
 Ci timis
 (...)
 Li kolomb' min faris ;
 kaj [kovritaj estis] miaj brakoj,
 kiel bird', [per plumoj (?)].
 Min [k]aptinte, li kondukis min
 al la Obskura Restadej', la Regno de Irkalla,
 restadej' de kie ne eliris iam
 tiuj kiuj ĝin eniris ;
 per la Vojo
 Senrevena,
 al la Restadejo kies loĝantaro
 estas senigita de la lumo,
 ekzistante plu nur dank'al humo,
 per argil' nutrate,
 kiel la birdar', kovrite
 de vestaĉo pluma,
 kuŝadante en tenebroj,
 sen t[a]g(lumon) iam vidi.
 Kaj mi mem, post kiam estis mi enkondukita
 [en (ĉi tiun) polv]an [restadejon],
 povis (tie) vidi
 amasiĝon de kronuloj,
 kaj (la babiladon) aŭdi
 de kronitaj kapoj, iam suverenoj de la ter' ;
 [de tiuj kiuj], al Anu' kaj Enlil, (iam,)
 kaj rostitan karnon prezentadis,
 kaj oferis kuiritan panon,
 kaj trinkigis freŝajn akvon kaj trinkaĵojn.
 En ĉi tiu polva restadejo,
 kien enirinta estis mi,
 kunsidis
 Altranguoj kaj Ĉefpastroj,
 Ekzorcistoj kaj Ĉefcelebrintoj,
 Purigistoj de la Grandaj Dioj,
 Etana', Sumukan,
 la Infer-Reĝino Ereŝkigal !

Forpasintoj

[Bêlet]-Sêri, ŝia sekretariino,
antaŭ ŝi klinita,
tenis [tabuleton]
kiun ŝi laŭtlegis.
[Tiam (La Reĝin'), levante] sian kapon
fiksita sur mi la rigardon :
"[Kiu do (ŝi diris,)]
(tien ĉi) kondukis tiun homon ? (...)"

(...)

[Pri mi kiu, en (vivlonga) kompanio kun ci,]
(spertis kaj) [trapa]sis tiom da dan[ĝ]eroj,
ho amik', me[moru] :
ne [forĝesu] ion ja el ĉio kion mi eltenis !"

(Diris al si Gilgameŝ' :) "Amiko mia
vidis songon nekon[traŭstareblan] :
ekde l' tago kiam li ĝin vidis
li ja perdis [siajn fortojn] !"

Enkidu' kuŝanta restis :
dum unua tago, [dua tago],
tiel ke li ne kapablis ellitiĝi,
[la malsano] de Enkidu [pligraviĝis].
Trian tagon, kvaran tagon,
[same] ;
kvinan, sesan, sepan tagojn,
<same> ;
okan, naŭan, [dekan tagojn],
[same].
Poste, la malsano de Enkidu
[(eĉ ankoraŭ) pligraviĝis],
kaj la dekunan, la dekduan tagojn,
[same].

Enkidu' [malkuŝiĝetis]
en la li[to]
kaj, alparolante Gilgameŝon,
[li murmuris (?)] :
"Do, forlasis min amiko [mia] !
(...)
Kiel li [al mi promesis]
en Uruk',
[li helpis al mi]
(kiam) timis mi batali !
Sed li, kiu [(iam) helpis al mi (?)],
[min forlasas en ĉi tiu horo (?)] !
[Tamen (?),] ci kaj mi,
[ĉu ni ne devis resti neapartigeblaj (?)] ?

(...)"

(Mankas la fino de la Tabuleto VII)

Tiu ĉi traduko baziĝas sur "la verkoj de la plej bonaj fakistoj" por la hitita versio, kaj sur la laŭvorta franca traduko de J. Bottéro por la nineva.

S-ro **Nikkyo Niwano**, fondinto de la budhista movado *Riŝo Kosejkaj*, honora prezidanto de la **Monda Konferenco pri Religio kaj Paco**, kaj prezidanto de ties *Japana Komitato*, mortis 93-jara.

Li kunprezidis en Kioto en 1970 la 1^{an} Mondan Sesion de WCRP (kies Programa Direktoro de la Organiza Komitato estis s-ro Y. Umeda, poste ASISTI-prezidanto) ; faris paroladon en 1978 ĉe la 1^a Speciala Sesio de UN-Ĝenerala Asembleo pri Malarmado ; kunprezidis kun la **Papo** la Malferman Sesion en **Vatikano** (kie ĉeestis la ASISTI-sekretario) de la 6-a monda WCRP-sesio en 1994.

S-anino **Jeannine Vincent**, dumviva IKUE-anino, mortis en aprilo en Baugé, post 50-jara E-aktivado. En 1960 ŝi jam instruis esperanton ĉe elementa lernejo en sia urbo Les Andlys, kaj en 1964 protokolis dum Konsilio-kunsido de la nacia E-asocio UFE. Ŝi estis kasistino de Franca Ligo de Katolikaj Esperantistoj, kaj redaktis kaj ties bultenon *Franca Katolika Esperantisto* kaj *Espéranto et Culture*, organon de GEE, nacia filio de ILEI.

Ŝi transloĝiĝis apud **Grésillon** (kies kason ŝi prizorgis), en Baugé, kie ŝi estis UEA-fakdelegitino ekde 1983, pri pedagogio kaj kuirarto. Ŝi partoprenis regule en la UK-oj, almenaŭ ekde 1954, kaj en tiuj de *Franca Katolika E-Asocio*.

Kiel direktorino de la ekzamenoj de Franca E-Instituto, kies ankaŭ kasistino ŝi estis, ŝi subskribis en 1986 mian 1^{an} E-diplomon. (Ŝi ankaŭ estis komitatanino de SYM (*Kvinpetalo*)).

Ŝi poste fariĝis legantino de *Asistilo*, kaj la redaktoro lastfoje revidis ŝin en julio 1999, iom lacan sed same viglan kiel ĉiam ; neniu sciis ke kancero forprenos ŝin en kelkaj monatoj. (*Ch. L.*)

La personecon de alia katolika *Asistilo*-legantino, **Franca Concina**, kasistino de U.E.C.I. (itala filio de IKUE), rememorigis per kortuŝa artikolo en *Dumonata bulteno* (51 p. 15) ties redaktoro A. Zecchin. Ŝi estis ankaŭ homaranismema, kaj amikino de Ada Fighiera-Sikorska (*Heroldo*-redaktorino).

Mi renkontis ŝin en Rotterdam en 1988, okaze de la Inter-Religia Kunveno Esperantista dum la 73-a Universala Kongreso. (Ŝi mortis en 1996).

Samjare mortis plia kristana *Asistilo*-leginto, la **pastoro Kenneth Twinn**, UEA-fakdelegito pri unitarianismo dum 56 jaroj, menciita en la lasta n-ro de *World*, la organo de IARF (kies asociita membro ASISTI estas) ĉar li estis komitatano de ties brita sekcio : "Li estis ankaŭ lingvisto kun kontaktoj en tuta Eŭropo, kaj estis speciale kuraĝiga kaj helpa por sufiĉe izolitaj liberalaj religiaj grupoj en Italio kaj Danlando." (p. 12) □

Leteroj

For la religian malamon!

Jam de pli ol dek jaroj mi spertas ion malagrablan. Mi ne imagis ke tio povus okazi. Mi ne nur miris, kiam tiu fenomeno kutimiĝis ĉe la loĝantaro en mia lando, sed mi penis serĉi la veran kaŭzon por ĝi.

Antaŭ la alveno de fremduloj, **nijaj prapatroj** havis siajn proprajn diojn, je kiuj ili firme kredis. Ili **konis la manieron kontaktiĝi kun siaj dioj**. Poste alvenis araboj por komerci. Ili havis sian kredon, pri kiu ili sukcese kredigis la homojn. Tio verŝajne estis en nia lando la komenco de islamo, kiun la araboj laŭeble plej forte provis disvastigi. **Islamo do estis la unua fremda religio** pri kiu nijaj prapatroj ekinteresiĝis.

Poste ja venis aliaj eksteruloj. Ĉi-foje estis eŭropanoj kun sia kristana religio. Kiel en la unua kazo, oni akceptis ankaŭ la novan kredon. **Kristanisman ili disvastigis konstruante lernejojn, preĝejojn, ktp.** Multaj homoj kristaniĝis.

Ekzistas do tri kred-kategorioj en la lando: kristanoj, islamanoj, kaj tiuj kiuj daŭre kredas je siaj dioj. Dum pli ol cent jaroj la eŭropanoj restis en la lando, kaj multon faris por la landa evoluo.

Kiam fine la britoj transdonis la regadon al tanzanianoj, komenciĝis la 24-jara reĝimo de nia nuna prezidento, d-ro Julius Nyerere. Dum lia regado **ne estis religiaj kvereloj**. Bedaŭrinde fine de la dua reĝim-periodo de nia 2^a prezidento, s-ro Ally Hassan, komenciĝis certaj fiagoj.

Islamanoj ekdiris ke ili en la propra lando vivas kiel duarangaj homoj – de kie venis tiu ideo? – kaj ke ili ne estas same edukitaj kiel la kristanoj. Islamaj grupoj ne nur neis publike la kristanan kredon, sed ankaŭ ke Jesuo Kristo estas Filo de Dio. Aŭdinte tion kristanoj ne volis pacienci kaj reagis.

Ĉiuj sciu ke kiam tia situacio ekestas, paco neniam estoŝ retrovata kaj multaj homoj, pro stultaj kontraŭdiroj, pereos. Mi ne povas vidi sencon en disfalo laŭ ekzemplo de Jugoslavio kaj alilande.

En nia lando troviĝas familioj kie iuj estas islamanoj, aliaj, judoj, aliaj, kristanoj. Tiel, kondamnante iun alian pro kredo, sciu ke vi kontraŭstaras vian fraton. Pro tio mi volas insiste admoni ĉiujn kiuj disvastigas sian kredon, ĉesi la kvereladon. Ĝi ĉiam kaŭzas pereon de senkulpaj homoj.

Male, ni devas kune konstrui bonfartron komunan, kaj amikiĝi kun homoj ĉie sur nia planedo.

Ambrose F. Polle (Tanzanio)

(El *Kontakto*, n-ro 175 (2000/1), p. 15.)

Interreta dissendo-listo pri persona kaj spirita evoluo

Mi anoncas la lanĉon de nova dissendo-listo en esperanto, la listo *Privivo*. Temas pri persona kaj spirita evoluo.

Ni pensas ke multo en la mondo estas ankoraŭ malkovrinda (scienco ne povas klarigi ĉion), kaj ke la **homo estas en daŭra evoluo** (emocia, mensa, spirita).

En la listo ni proponas al vi:

- paroli kaj interŝanĝi opiniojn pri libroj;
- renkonti aliajn "serĉantojn": persona evoluo estas soleca vojo, kaj kelkfoje agrable estas povi libere babilu pri tio;
- interŝanĝi personajn spertojn: **esti komprenata de aliaj homoj jam helpas antaŭeniri**, kaj la spertoj de aliaj ebligas ekkonscii ke ni travivis la samon sen atenti pri ĝi, ekzemple;
- evoluigan spacon en helpema kaj kuraĝiga etoso: grupa forto povas multe helpi kiam oni spertas malfacilaĵojn;
- eblecon labori pli konkrete, se ni tion deziras: eblas krei subgrupojn pri diversaj temoj;
- **esti toleremaj** pri diversaj diskutataj temoj: la tereno estas tre larĝa, kaj ĉiu el ni havas proprajn ŝatojn. Tio estos toler-ekzerco por ĉiu!

Pliaj informoj haveblas ĉe:
www.libro-koncept.ch/privivo.

Marion Belisle

(belisle@span.ch)

(El *TEJO Tutmonde*, n-ro 3/85 (7/9-1999), p. 31.)

Saluton Kristian!

Mi tre hezitis ĉi-somere pro cia rekomendo, ĉu mi iru al Polio [por la Interreligia Seminario Esperantista] aŭ ne. Sed (...) mi ŝanĝis tre (aŭ tro?) improvize mian direkton al **Gorazdeo (Bosnio)** pro entuziasma propono de Ana. Nu, ankaŭ pri tio mi sufiĉe hezitis, ĉar mi persone nenium konis en eks-Jugoslavio.

Sed imagu, kvankam dum tiu vojaĝo mi renkontiĝis kun malmultaj esperantistoj, tamen el ili estis serba ortodokso, katoliko kroata kaj islamano bosna ...kaj kompreneble ankaŭ nereligiemuloj.

Islama kuracisto en Sarajevo tre interesiĝis pri ĉiuj religioj ĝis ŝamanismoj en la mondo, kaj ankaŭ pri etnoj kaj iliaj tradiciaj kuracmetodoj ktp... Sed! Li bedaŭrinde ne estas mem esperantisto: nur la patro de esperantistino.

Ljo

Sarajeva Interreligia Konsilio

Antaŭ tri jaroj estis fondata en Sarajevo Interreligia Konsilio, kiun eniris la plej altaj reprezentantoj de 4 religiaj komunumoj en Bosnio-Hercegovino: la islama, ortodoksa, katolika kaj hebrea. Ĝia tiama deklaro pri kuna morala engaĝiĝo altiris la atenton de la enlanda kaj eksterlanda publiko. Tion atestas postaj invitoj al anoj de la Konsilio gastis en pluraj landoj por interŝanĝo de spertoj.

En la **7-a monda sesio de WCRP** (la Monda Konferenco de Religioj por Paco) okazinta en **novembro 1999 en Amano**, Jordanio, anoj de la Konsilio prezentis siajn spertojn kaj la Deklaron.

En la "**Deklaro**", dokumento de daŭra valoro, oni emfazas ke post finiĝo de la milito en Bosnio, le ĉefa tasko estas establi daŭran pacon bazitan sur justeco, vero kaj kunvivado. Oni agnoskas la ekziston de diversecoj, sed ankaŭ de multaj komunaj valoroj sur kiuj povas baziĝi la kunvivado en Bosnio-Hercegovino. Oni **insistas pri respekto** de fundamentaj homaj rajtoj kaj kondamnas perforton (...)

La respekto de **bazaj homaj rajtoj** bezonas ampleksi: liberan mision de religiaj komunumoj en tuta Bosnio-Hercegovino, libera diservado kaj religia porinfana eduko en propra religia komunumo kaj ties institucioj. Oni invitas ĉiujn bonvolemajn homojn respondi pri propraj aferoj, kaj trakti aliulojn samkiel vi dezirus ke ili vin traktu.



Emfazindas ke **Sarajevo**, ĉefurbo de Bosnio-Hercegovino, estis dum jarcentoj ekzemplo de kunvivado, **toleremo kaj reciproka respektado**.

La agado de la Interreligia Konsilio, kiu eldonis antaŭnelonge glosaron de 1256 religiaj nocioj el la kvar religioj, atestas pri similecoj kaj malsamecoj, pri fundamentoj de la kunvivado kaj de komuneco en diverseco. Ĝi povas servi ankaŭ kiel valora sperto por aliaj specifaj kaj kompleksaj ŝtatoj kaj sociaj komunumoj en la mondo.

Mustafa Resulović*

* El *Bosnia Lilio*, n° 3 (5-1999), p. 3. (Subteninda, kaj bonebla kontraŭ 5 eŭroj al UEA-konto "elbh-j".)

La sankta Kuraano

Kuraano, araba vorto, signifas *legataĵon*, aŭ "la libro kiun oni multe legas". Pli ol 200 bilionoj da islamanoj¹ [parte] recitas ĝin po kvin fojojn tage. (La *a* estas longa, tial ni skribas: Kuraano.)²

Ĝi estas baza kaj fundamenta libro de Islamo. Islamanoj legas ĝin kiel sanktan kaj leĝdonan libron. Ili kredas Kuraanon *kitaab-ullah*: "libro de Allah" (araba nomo de Dio). Se oni volas scii pri islamo oni devas legi la libron de islamo, t.e. Kuraanon. Kio estas en Kuraano, tio estas islamo; kaj kio ne estas en ĝi, tio ne estas islamo.

La diroj kaj agoj de la sankta profeto de islamo, s-ro Muhammad, benita de Allah, estas klarigoj pri Kuraano. Islamanoj kredas *Kaana ĥuluku huu Al Kuraan*: "La Kutimoj de la profeto estas laŭ la Kuraano". Li klarigis la celojn kaj signifojn de la Kuraanaj vortoj kaj terminoj per siaj diroj kaj agoj.

La klarigojn pri Kuraano ni povos prezenti al vi dum venontaj jaroj, *InŝaAllah* (se Allah volas).

Reeldono de la sankta Kuraano

Ni volas reeldoni la sanktan Kuraanon. Ties eldonado kaj poŝta sendado estas malfacila kaj kostega afero. Ni ne povas sendi ĝin senpage; do ni bezonas vian helpon por kovri la sendkostojn. La kompleta traduko de la sankta Kuraano (8x5) konsistas el 630 p., kostas 15 US \$. S-ro Muztar Abbasi esperantigis ĝin, s-ro Amjad Butt eldonis. *Kosar Ahmed Memorial Sports & Welfare Trust* (bonfara asocio) monhelpis por ĝia eldonado.

Titolita *Vera Libro* (92 p., 8x5 [coloj]), la 1^a vol. de la Sankta Kuraano konsistas el la 5 unuaj partoj (el 30) de la Sankta Kuraano; ĝi estas ricevebla kontraŭ nur 5 irk, por kovri la poŝtkostojn.

Alia islama literaturo

Kiel klarigadon pri la malfacilaj versoj el la Sankta Kuraano UIEA (Amjad Butt, Lower Mall, 47150 Murree, Pakistano) eldonis jenajn libretojn, riceveblajn kontraŭ po 1 irk: *La vivhistorieto de islama profeto s-ro Muhammad (Benita de Allah)*; *La lasta parolado de la lasta profeto (B.A.)* [12 p., dulingva, vd. n-ron 21 p. 32]; *Tezoj pri islamo* (respondoj al gravaj demandoj de neislamanoj) [12 p., vidu samloke]; *Alif Laam Miim* (trad. de la 1-a parto de la Sankta Kuraano). **Bashir Bhatti**


¹ Estimoj pri islamanoj en la mondo: 800 milionoj (en 1980, laŭ Habib Chatty, tiama ĝen. sekr. de la Islama Konferenco), 722 milionoj (samjare, laŭ *World Christian Encyclopedia*), 805 milionoj (en 1984, laŭ *Centre des Hautes Etudes sur l'Afrique et l'Asie modernes*), 820 milionoj (laŭ la Komisiono "Eklezio kaj Islamo" de la Protestanta Federacio de Francio, 1991).

² La Red. ne aprobas tian neesperantistan uzon.



Granda Unueca Kredo

– Parto I –



ĉ. 2 : Mekanismo (fino)

10. Ĉu vi vidas ? : Kiel rapide la giganta stelo en la kosmo dispeciĝas ! Kiel la amaso da homoj tuj pereas sur bruliĝinta tero ! Singardu, homoj ! Tia mutacio troviĝas ĉie tra la mondo.

11. Post mutacio en ĥaoso,
la nova ordo kaj strukturo aperus !
Dume la subapero ŝanĝus sian pozicion kaj ideon.

12. Mi nomas la elementan forton de la kosmo amo kiu koncentras aperon.

13. En ĥaoso ne troviĝas certeco. Sed GUKo ĉiam rekompensas tiun kiu penegis kaj amas funkcias !

14. Antaŭ apero troviĝas nur direkto kaj ne celo !
La direkto estas al sino de GUKo ! Homoj ofte metus celon kiel signon de direkto antaŭ si. Ili iras kontraŭ la direkto, ili do malsukcesus !

GUKo tiel benu nin !

15. Kiel kreskas la apero ?
Per koncentriĝo en sino de GUKo,
en psikologio tiu forto respondas amon.

Je nomo de GUKo :

*"Novan ordonon mi donas al vi :
vi amu unu alian kiel mi vin amas.*

*Per tio oni ekkonos ke vi ja estas miaj disĉiploj,
se vi amas unu alian". (Johano, 13,34-35).*

16. Je nomo de GUKo, en la dezerta universo vi estas unu el la aperoj, sole kaj senespere. Mi, uzante amon, ligas vin ĉiujn. Mi do ordonas : por amo vivu ! per amo vivu ! Amen.

17. Tra GUKo mi prenas manon de la kosmo, kaj sentas la varmeton. La voĉo jene sonas : esploru, esploru la vastan spacon antaŭ vi, la bravuloj ! Mi jam donacu al vi sciencan ideon, kiu estas brako de via animo ; vi ne fariĝus handikapulo pro tio ! En formo de vero konstruu pompon de vivo !

18. Ge-GUKistoj, ĉiam helas amo !
ĉie ekzistas amo !
ĉiu bezonas amon !

19. Atendu antaŭ la atingo de via vico !
Ili superas tempon, ili do pereu !

20. En GUKo,
ni prenas vivon kiel serion da aperaĵoj,
tio estas fundamento de nia filozofio !

21. Je nomo de GUKo,
per tempo priskribu mian kontinuan povecon,
per spaco priskribu la grandecon de apero !
Tempo estas mia sango,
spaco estas mia haŭto !

22. GUKo evoluas ne per ŝanĝo de Skribo,
sed per via koro !

23. Vi estas forta estaĵo sur Aŭstralia stepo,
vi scias kiam kuri, kiam salti ;
ne kiel vermo ĉiam lante rampas en feĉo !
Amen.

24. Kiel GUKisto[j],
ili scias kiam haltigi sian laboron ;
ĉe kulmino de sia afero ili eĉ forirus !
Tio ja estas laŭ GUKo !

25. Konstanto pri la kosmo troviĝas,
sama modelo etendiĝas en diversaj fakoj.
En GUKo, ĉio unuecas !

26. Ĉio en la kosmo laŭ malsama vojo iras,
sed al sama direkto : ...la sino de GUKo.

27. Tra la kosmo nenio estas en izoleco,
GUKo prenas ĉiujn manojn,
kaj per amo flegas nin ! Amen.

28. Kie troviĝas kialo ? kie troviĝas rezulto ?
Ĉio en proceza valo, kuras.

29. Ekde komenco de apero,
el unu dividiĝas du,
el du dividiĝas tri,
el tri dividiĝas ĉio.
GUKo tiel abundas !

30. Ne ignoru movadon de papilia flugilo,
kiu signifas ŝtormon.

31. En granda kuŝas malgranda,
en malgranda kuŝas granda,
tial, sur folio troviĝas GUKo !

32. Per GUKo
la nova rilato reliefus,
la nova sento venus,
la nova ordono realiĝus !

33. Se vi amas la frukton,
bonvolu ami la radikon,
kiu estas fonto de vivo. Amen.

Infanaj preĝoj

Ĝis la dua mondmilito, ĉiutage en la lernejoj de Hungario jenaj preĝoj* estis komune dirataj de la lernantoj, kiu ajn estis ilia religia aparteneco. Kaj en multaj norvegaj hejmoj infanoj diras aŭ kantas la sekvajn preĝojn**. (La unua estas verkita de Sophie Bonnevie.)

Hungara preĝo antaŭ la instruado

Kérünk téged, jóságos Istenünk, segíts bennünket, hogy jók és figyelmesek legyünk a tanulásban és mindig kövessük szent akaratodat. Áld meg hazánkat, szüleinket és nevelőnket, végül áldj meg minket is. Amen.

Ni petas vin, bonega Dio, helpu ke ni estu bravaj kaj atentemaj en lernado kaj ke ni ĉiam sekvu vian sanktan volon. Benu nian patrimon, niajn gepatrojn kaj edukistojn. Fine, benu ankaŭ nin. Amen.

Hungara preĝo post la instruado

Hálát adunk neked, Mennyei Atyánk, hogy kegyelmedből ma is előbbre jutottunk magunk és világod megismerésében. Légy velünk, hogy hű gyermekeidhez méltóképpen éljünk felebarátaink javára, lelkünk üdvösségére és a te szent neved dicsőségére. Amen

Ni dankas vin, ĉiela Patro, pro via graco, per kiu ni ankaŭ hodiaŭ antaŭiĝis en la ekkono de nia memo kaj de via mondo. Estu kun ni por ke ni vivu digne, kiel viaj fidelaj infanoj, je favoro de la proksimuloj, la savo de nia animo, kaj por la gloro de via sankta nomo. Amen.

Norvega matena preĝo

Salme

Når dagen atter sender
sitt lysvell over jord,
vi rekker våre hender
mot deg, vår Konge stor.
Hjelp oss i dag å vandre
på sannhets faste vei,
og bringe lys til andre
met hjertet vendt mot deg !

Kantiko

Kiam la tago denove sendas
sian lum-abundon sur teron,
ni levas niajn manojn
al ci, nia granda Reĝo.
Helpu nin hodiaŭ paŝi
sur la firma vojo de vereco,
kaj alporti lumon al aliaj
kun la koro turnita al ci !

Aftenbønn / Vesperpreĝo



Kjære Gud, jeg har det godt. Takk for alt som jeg har fått. Du ergod, du holder av meg.
Ka - ra Di', mi bon - far - tas. Dankon pro ri - ce - va - ŝoj. Bo - nas ci, kaj ci min amas.



Kjæ-re Gud, gå al-dri fra meg. Pass på li - ten og på stor, Gud, be-va-re far og mor.
Ka - ra Di', ne min for - la - su. Pri zorgu e - tajn, grandajn Di', gardu pa - ĉjon, pa - njon.

* Surpaperigitaj de hungara partoprenintino en la 2-a *Interreligia Seminario Esperantista* (Szombathely, 1995).

** Jam reproduktitaj, sen la muziko sed kun franca traduko, en la *Supplément Français à Asistilo n-ro 9*, p. S16.



Taoistaj prezentoj en amerika E-kongreso

En la 4-a Tutamerika Kongreso de Esperanto, de la 28^a de januaro ĝis 3^a de februaro, en Bogoto, partoprenis grava TEKU-delegacio.

Pli ol dudek gemonahoj ravis la kongresanojn per diversaj prezentoj spegulantaj tiel la *tao*-ajn vivmanierojn kiel la kolombian etoson. La luktartaj, gimnastaj, akrobataj kaj maĉet-artaj elmontroj atestis pri altkvalita regado, malgraŭ manko da spaco, por esprimi senbremse la kapablojn de la praktikantoj.

Estis klarigita al la spektantaro ke tiuj aktivecoj, eĉ en lando kia Kolombio kie perforto estas enradikigita kutimo, tute ne celas perforton, sed devas esti rigardataj kiel dinamika meditacio kaj provo atingi gestan perfektecon pere de mensa koncentriĝo.

Kaj talentaj kantistoj kaj muzikistoj favore impresis, montrante ke la taoistoj majstras artojn ĉiaspecajn. La juneco kaj la internacieco de la taoistoj (Kolombio, Venezuelo, Ekvadoro, Danlando, Usono, Francio) plivigliĝis la etoson de la kongreso.

Ankaŭ estas notinde ke tri taoistoj membris kaj efike aktivis ĉe la Loka Kongresa Komitato.

Lastatage Philippe Chavignon prelegis (temsimile al kion li prezentis dum la Universala Kongreso en Prago sub la titolo "*Regenerado spirita kaj korpa laŭ Tao-devenaj teknikoj*") pri la diversaj aspektoj de la instruoj de la majstro Kelium, fondinto de la **Tao-Eklezio Krista Universala**, kies sidejo kaj ĉefmonaĥejo situas en Kolombio.

(...) Interesis la kongresanojn jena "revelo"*, kiun Ph. Chavignon eksciis el la majstro Kelium: se oni retrolegas la nomon Zamenhof, ĝifariĝas *fohnemaz*, aŭ *fohnemas* (laŭ la germana deveno Samenhof), facile rekonebla formo de la radiko *fonem*! Ĉu estas hazardo ke la kreinto de la universala lingvo nomiĝis fonemas, t.e. fonemoj?

(...) La kongreso kaj la plurmonata restado en Kolombio de Philippe kaj lia edzino Susan, estis la okazo eldoni albumon kun fotoj de Susan kaj citaĵoj de la majstro Kelium**.

Philippe Chavignon

* "*Develo*" estus pli ĝusta vorto; *reveli* sugestas: remeti la velon aŭ la vualon, tute ne: alporti al la ĝenerala kono ion kaŝitan, t.e. levi la vualon.

** Kvarlingva: hispana, esperanta, franca, angla; 20 gld.; ĉe: M.F. du Plan, F-06470 Guillaumes.

Ni bonkore kunridu

Campos do Jordão, 01/02/2000

Estimata, La komento [en 24, p. 31] de Jacqueline (bone konata) ne havas valoron pro diversaj motivoj (...) Anarkio ne povas degeneri pro la simpla fakto ke socie ĝi ankoraŭ ne estas "generita". Iam oni provis "*trudi al ĉiuj ateismon*": ne la anarkiistoj sed la "**komunistoj**". La afero fiaskis.

Verdire mi ne estas ateisto, ĉar mi ne neas: mi ne povus nei ion kio ĉe mi ne manifestiĝas, kaj mia nefidema menso ne akceptas simplajn "kredojn" surbaze de senfinaj, mistikaj, mistifikaj vortjongladoj. Bedaŭrinde, estimata Doktoro, Teologo, Profesoro C. Lavarenne, mi **ne havas kapablon akompani vian diecan movadon**, ĝuste ĉar mi ne estas D^{ro}, Prof. k.s.

Evidente, se la homoj vere tion bezonas, **ununura religio** estus la solvo (eble) por la tielnomata paco, sed kiel forigi ĉiujn dogmojn, verajn verojn, fierojn, hipokritaĵojn, stultaĵojn ktp. ktp, kiuj regas?

Por ke oni ne diru ke mi estas entute maltolerema, mi eĉ recenzis spiritisman verkon*.

Antaŭ kelkaj jaroj la fama "**Legio de Bona Volo**" – mi ne vidis mencion pri ĝi en [la lasta] n-ro de *Asistilo* – konstruis templon pli luksan ol Vatikano, por religia ekumenismo **iel kiel ASISTI, Oomoto k.a.**, inkluzive por ateistoj. Mi eĉ ricevis inviton: sufiĉas "kredi" je la evangelio de Kristo, oni diris...al ne dikredantoj!

Bonvolu ridi, se vi povas kaj volas.

Kun miaj sinceraj salutoj. **Gilbert Ledon**

Jacqueline Lépeix "decidis nenion publikigi ĝis 1^a de marto 2002", do **ne tuj povos respondi!**

Pri preciza "trudo de ateismo" mi ne scias, sed ŝajnas ke anarkiistoj partoprenis almenaŭ en detruo de preĝejoj kaj **mortigo de pastroj** ktp. Ekzemple en Katalunio en 1936, "okazis neeldireblaj krimoj ambaŭflanke (...): de laŭnomaj kontraŭfaŝistoj estis murdataj esperantistoj, kiel pastro Joan Font Giralt", IKUE-prezidanto, kaj 200 neesperantistaj sacerdotoj en la diocezo de Girono: ĉu nur de komunistoj?

Mi ne estas Profesoro: ekstera **lektoro** pri hinduismo ĉe "Instituto de Scienco kaj Teologio de Religioj"; nek "Teologo": nur bakalaŭro pri teologio. Sed ĉefe maltaŭgas la esprimo "dieca movado", se temas pri **ASISTI**, kiu **nur celas studadon**; kaj ja ne ekumenismon (tradicie rezervita al kristanismo). **ASISTI** estas religie **neŭtrala**, ne kristocentrita (vd. "Kio estas LBV" en n° 4). Estas eĉ **ateistoj inter ni!**

* *Brazila E-isto*, 6-1999, p. 8-9: Pereira, *Memoraĵoj de Sinmortiginto*, kiun ankaŭ nia redaktejo ricevis (vidu p. 28): **recenzontoj serĉataj** pri i.a. spiritistaj libroj!



Mulaj Smail Bur-Kaiba: "Beni Mellal" (1999, 65x50 cm)
"La vera majstro ne estas tiu kiu kondukas cin vane laciĝi, sed trovi cian spiritan bonfariton."
 Abû-l-Hasan as Šâdhilî (XIII-a jc.)
 (Eldonita de *Horizons Maghrébins*, ciam@univ-tlse2.fr)

Kara amiko Christian, Milano, 14-1-1999

Ĉar via gazeto pritraktas ekumenajn aferojn, en la 2000-jara jubileo de la kristana religio estas interese vidi kiel mistikulo pritraktas la problemon.

Kompreneble kion devus ĉefe celi aŭtenta ekumenismo, tio estus komprenigi al la sinceraj Diserĉantoj la neceson de persona sperto, t.e. gravigi la praktikan flankon de la superega Konado, per kiu oni eniras en rektan kontakton kun la primaraj manifestiĝoj de Dio.

La praktika parto komenciĝas kiam aŭtenta kaj vivanta Majstro de Spiritualismo (kiun *Homo Centro* feliĉe havas) konsentas la sanktan Inicadon en la misterojn de la Transo. En tiu momento oni ricevas, laŭmezure de sia spirita substrato, la samajn spertojn - de diaj Lumo kaj Sono -, kiujn travivis la Apostoloj en la Pentekosta tago, spertojn de tio kion la Biblio nomas "Sankta Spirito".

Tiuj (internaj) Lumo kaj Sono konsistigas la primarajn manifestiĝojn de la Povo de Dio en Sin-esprimo. En multaj lokoj de la Biblio oni povas trovi priskribojn de tiu sanktaj Esprimiĝoj per kiuj Dio faras Sin perceptebla. Vidu la liston de referencoj ĉi-apude. (...)

Akceptu tutkorajn salutojn kaj sincerajn bondezirojn de plej Lumo-plena, prospera kaj feliĉa Kristan-jubilea jaro, de via itala amiko-frato

Enriko [Marzola]

Leteroj

Kara Amiko,

Provenco, 31-12-1999

Dankon pro via sendo de Asistilo, kiun mi ricevas kun plezuro kvankam mia scipovo de esperanto estas ege limigita.

Dankon pro la citaĵo el mia prozo [24, p. 3].

Feliĉan novan jarmilon. Ni esperas ke ĝi estos pli bona ol tiu kiun ni forlasas !

Tutamike [pastoro] **Christian Mazel**

Estimata sinjoro,

Leek, 16-1-2000

Olúwábùnmi Gabriel Oshó-Dauijes nekredible asertas (n-ro 24, p. 15): "**Amo estas la ĉefa afero** pri kiu temas en la Biblio (...) La tuta Biblio povus esti resumita tiel ĉi: *Amu Dion, amu kunhomojn!*"

Via korespondanto devas esti treege elektema pri siaj tekstoj el la Sankta Biblio. Mi atentigas lin al la **dekretoj de Dio rilate mortpunon**; tiun ĉi ili postulas pro miloj da "krimoj". La Dio nek nuligis nek eligis la kondiĉojn rilatajn al mortpuno pro jenaj pekoj, kaj multaj aliaj:

Adulto (Lv 7,25); samseksemo (Lv 18,22; 20, 13); **adorado de aliaj dioj** (Rd 13,6-11); sang-adulto (Lv 18,6-18; 20,11-21), kvankam patra sang-adulto kun filino ne estas ofendo; seksatenco (Rd 22,25); sorĉarto (El 22,18); enstomakigo de best-sango (Lv 3,17; 7,26-27; 17,10-14); forkaptado (El 21,16; Rd 24,7); **posedo de idolo** (Jos 7,10-26); **manĝegemo aŭ ebrieco** (Rd 22,20-21); novelzinoj kiuj ne estas virgaj (Rd 22,20-21); ktp. ktp.

Do, **amo ne estas la ĉefa afero** en la Biblio; tiu ĉi estas barbara kaj kruela. Kaj la malnova testamento estas ankoraŭ aplikebla, laŭ jenaj vortoj de Jesuo antaŭ 2000 jaroj: Mt 5,17-19 kaj Lk 16,17. Ankaŭ Paŭlo konsentis: 2Tim 3,16.

Sincere via

W.H. Simcock

(Esperanto-Asocio de Humanistoj)

Clayton House, Butterton, Leek, Staffs., ST13 7SR, GB

Referencoj de bibliaj priskriboj de la diaj manifestiĝoj de Lumo kaj Sono

Agoj 2,2-3. Alta K 6,10. Apok. 1,10; 1,14-16; 2,28; 4,1-6; 10,1-4; 14,2; 15,2; 19,1; 19,6; 19,12. El 3,2; 19,16; 19,19. Ĥab 3,4. Ijob 37,3-5; 37,22; 38,1; 40, 6; 40,9; Jeh 1,4; 8,2; 43,2; Jer 10,13; 25,30. Jes 29,6; 30,26-32; 59,19; 60,20; 62,1. Jn 3,8; 12,29. Lk 11,36. Mal 4,2. Mt 13,43; 17,2. 2Pet 1,19. Pr 11, 7. Ps 18,13-14; 29,3-9; 46,7; 50,3; 68,34; 84,12; 104,7; 105,39; 107,25; 147,18. Rd 4,11-12. 1Reĝ 19,11-12. Saĉ 7,29; 10,17; 18,3. 2Sam 22,13-14. Sent 4,18; 30,5. Sir 24,30; 46,17.

Bonvolu samtempe respondi jenan **demandaron**
(por la strategia IARF-plano pri 2000-2006,
okaze de la IARF-centjariĝo)
resendotan al la redakto antaŭ 15-7-2000!

(Se la loko ne sufiĉas, bonvolu uzi alian folion.)

1. (proponita) Deklaro pri la celoj.

"La Internacia Asocio por Religia Libereco komprenas kaj antaŭenigas la religian liberecon kiel

– liberecon je ŝtata enmiksiĝo kaj diskriminacio en religio aŭ kredo ;

– toleremon kaj harmonion inter religiaj komunumoj ; kaj

– respekton de la religiaj komunumoj por la homa digneco de iliaj membroj.

Religia libereco estas fundamenta homrajto. Sekve, IARF subtenas kunlaboradon inter grupoj el diversaj religiaj tradicioj kaj solidarecon kun komunumoj suferantaj religian persekutadon aŭ diskriminacion."

1.1 Ĉu la **senco** de la ĉi-supra deklar-propono estas **klara** por vi? Taksu laŭ skalo de 1 (= tre malklara) ĝis 5 (= tute klara). Ĉirkaŭstreku: 1 / 2 / 3 / 4 aŭ 5.

Nun parolu pri kiu(j) ajn vorto(j), esprimo(j) aŭ frazo(j) kiu(j) estas neklara(j), kaj kio estas la malfacilaĵo(j) ?

1.2 Ĉu la deklaro estas taŭga por via IARF-membra Organizaĵo? Taksu laŭ skalo de 1 (= tute ne taŭga) ĝis 5 (= tute taŭga). Ĉirkaŭstreku: 1 / 2 / 3 / 4 aŭ 5.

Klarigu kiajn ajn specialajn uzojn por ĝi, kaj / aŭ problemojn kiujn ĝi kreas.

2. Kiuj estas la problemoj rilataj al religia libereco en via regiono, kaj kio estas la ĉefa kaŭzo de ĉiu el ili ?

3.1 Konsiderante la laboron de via IARF-membra Organizaĵo [= ASISTI] por aŭ kun IARF en la lastaj tri jaroj, kiuj estas la fortaj punktoj kaj atingoj pri kiuj ĝi estas aparte fiera ?

Asistilo-abonilo kaj ASISTI-aliĝilo

NEPRE RESENDOTA al Asisti, F-09800 Balagué

(Krom se vi jam abonas) Plenigu kaj ĉirkaŭstreku viajn elektojn

Plentarifaj landoj :

jarabono : 105 FF / 16 eŭroj (aliaj valutoj :)

minimuma aliĝo : 25 F / 4 e (aliaj valutoj :)

"Rabat-landoj" :

jarabono : 50 FF / 8 eŭroj (aliaj valutoj :)

minimuma aliĝo : 15 F / 2 e (aliaj valutoj :)

Studento / senlaborulo : duono de niaj tarifoj !

– Mi ĝiras al la UEA-konto : *asis-r*. La mia estas :

– (aŭ, nur en FF) al pĉk. : *Asistilo, 1042177 R Mars.*

– Mi pagas per irk / francaj poŝtmarkoj / monbiletoj jenan sumon (ciferoj :) (valuto :)

– **Mi nur parte / ne povas pagi sed deziras ricevi !**

3.2 Ĉu la IARF-membra Organizaĵo ankaŭ havas malfortajojn en rilatoj kun IARF kaj ĉi-ties aktivecoj, kiujn ĝi deziras venki ? Se jes, klarigu ilin :

4. La strategia IARF-plano pri 2000-2006 (...) estas verkita kun la intenco certigi ke niaj programoj (kiom ajn bonaj ili estas) ankaŭ rekte efektivigos la celon de religia libereco tia kia ni komprenas ĝin.

El jena listo de 9 (a-i) larĝaj tipoj de celoj aŭ programoj, kiuj 4 estas la plej taŭgaj por via regiono kaj IARF-membra Organizaĵo ; kaj kial ?

Rekomendo kaj politika premo

a/ Rekomendo pri **homrajtoj**, inkluzivanta la laboron de IARF ĉe UNO. Tio ĉi postulas esploradon, eble inkluzivigantan la akademian institucion, same kiel sistemajn klopodojn por disvolvi taŭgajn internaciajn leĝojn kaj instituciojn por ilia efektivigo.

b/ Konstrui efikan **reton kun progresemaj religiaj grupoj**, tiel plialtigante, ekzemple, la kapablecon influi politikajn kaj religiajn reprezentantojn.

c/ **Enfokusigi subpremado**n de religiaj minoritatoj, inkluzivante: helpadon al la situacio de viktimoj; laboro pri politika ŝanĝo por sekurigi religiajn minoritatojn; demarŝado al religiaj gvidantoj por sentivigi ilin pri la situacio en kiu minoritataj kred-grupoj estas.

Kunveno por diskutado kaj edukaj celoj

d/ **Loka interkreda kunagado** inkluzivanta koaliciojn, kompiladon de akceptebla terminaro, kaj etendi la manon al tiuj kiuj estas pli rigidaj (foje nomataj "fundamentistoj") en siaj kredoj.

e/ **Publika edukado** en lokaj grupoj (emfazante perceptitajn diferencojn sed ankaŭ tion kio estas komuna), kaj antaŭenigi liberecon de religio aŭ kredo laŭ socie respondeca maniero. Disvolvi edukatan materialon por studi en lokaj komunumoj.

20a Printempa Staĝo en "La Dragonnière" VIAS, Béziers, Francio



Cion bonan al vi kaj ĉiuj amideam

Foto 4-a

Io kio surprizis nin estas la ĉefa rolo de la virinoj, eĉ ili superis la virojn. Ekzemple en la supera kurso partoprenis: poetino F. Terral, aktorino Josée Boccadifuoco, s-ino Tereza Depecker, kiu respondecas pri "Kastelo Gresillon" kaj geinstruistoj, entute 10 gelernantoj.




Foto 5-a

Sed ne nur la celo de la Staĝo estas la studado, ankaŭ la aktiva partoprenado de la gelernantoj. En la "Vespero de Josée" kaj "Teatra Vespero" gvidata de la ĉefrespondeculo de la staĝo s-ro Jean-Pierre Peray, estis vere mirindaj, ĉar partoprenis en la du festoj preskaŭ duono de la gestaĝanoj, pli malpli 18.

FAMILIA NOMO :
PERSONA ("antaŭa") NOMO :
ADRESO (MAJUSKLE !)

Poŝtkodo : URBO :
(Laŭplaĉe) Tel. : Faks. :
Retpoŝta adr. :

– Mi fariĝas **subtenanta membro 2000** sendante (ekde 200 FF / 30 eŭroj) :

– Mi donacas **subtenan abonon 2000** por la revuo (ekde 150 FF / 25 eŭroj) :

– Mi **abonigas**, laŭ la tarifo valida por mi mem, jenan amikon (Nomo :)
(Adreso :)

(Kodo :) (Urbo :)
Dato : Subskribo :

f/ IARF-kongresoj kaj regionaj konferencoj, kun le celo inkuzivigi la atingon de ne-membroj kaj esti pli interaktivaj kaj rimedhavantaj.

Junularaj Programoj

g/ **Junulara programo** kiu enfokusigas kunvenigi ilin por engaĝigi sin sur interkreda bazo, kaj posta sekvado tra la jaroj.

Soci-Servaj Programoj

h/ Disvolvi novan tipon de imiteblaj projektoj de **socialaj servoj**. IARF povus provi disvolvi novajn praktikajn programojn kaj aktivecojn, ekzemple ĉe la nivelo de la komunumoj aŭ inter junuloj aŭ kun koalicioj kiuj reale kreskigos la religian liberecon. Tiaj projektoj devus kaj esti allogaj kaj klare plenumi la celon de IARF kia organizaĵo.

Aliaj larĝaj tipoj de programoj / celoj

i/ **Alia(j)** : Vi rajtas elekti tipon de programo/celo kiu ne estas en la listo. Se jes, bonvolu aldoni viajn novajn proponojn, kiel unu aŭ pli el la totalo de 4 elektoj kiujn vi estas petata doni ĉi-dorsflanke.

Donu la nomon de la program-tipo (ĉi-dorsflanke en grasaj literoj), kaj aldonu kiajn ajn pliajn detalojn, priskribon aŭ ideojn. Poste donu vian kialon por ĉiu tipo de programo, tiel ke ni povu reale kompreni la pensadon malantaŭ viajn elektojn.

1-a elekto (prioritato) :

2-a elekto :

3-a elekto :

4-a elekto :

5.1 Kian subtenon via Regiona Kunordiga Komitato kaj / aŭ Kunordiganto, kaj la Sekretariejo en Oksfordo, devus etendi al la membraj Organizaĵoj en la mondo? Ekzemple, kiaj **ŝanĝoj** kaj disvolviĝo de IARF kiel organizaĵo estas **necesaj** por asisti la efektivigon de la programoj? Kian **subtenon** aŭ helpon **bezonas via grupo**?

5.2 Al kiu aliaj interkredaj [= interreligiaj] organizaĵoj kaj / aŭ koalicioj vi apartenas?

5.3 Kiuj estas la ĉefaj interkredaj [= interreligiaj] aktivecoj en kiuj vi partoprenas?

5.4 Kion via grupo povas proponi por esti helpa al aliaj IARF-grupoj?

6. Kiujn pliajn komentojn vi deziras fari; aŭ ĉu vi havas konsilon por doni?

Dankon pro via partopreno en la proceso de strategia planado. Vi povos legi pluajn novaĵojn pri ĝi en *IARF World* [la IARF-organo; kaj eble ankaŭ en venontaj numeroj de *Asistilo* ?]

N.B. En almenaŭ 3.2, 5.1, 5.4 kaj 6., vi kompreneble povas paroli pri **esperanto!** (*La Red.*)

Ni ricevis

HIK elkore dankas geS-rojn Roma kaj Poul Thorsen pro la donaco al *Bibliothèque d'Espéranto du Couserans et des Pyrénées*, pere de la **Fondaĵo Biblioteka Apogo** kaj de UEA-libroservo, de jenaj libroj, markitaj per asterisko post la titolo. (La nereligiaj libroj estas jam listigitaj en nia supl. "Hejmoj", 14 p. 4).

Mia fenestro alĉiela (elektitaj poemoj [el *Ablakom égre nyílik*]), de László Ötvös, trad. de Tibor Papp, Debrecena Esperanto-Societo, 2000, 53 p.

Interrilatoj spirito-materio, de Jorge Andréa, trad. de Délio Pereira de Souza el la port., Rio de Janeiro : Societo Lorenz, 1998, 56 p.

Memoraĵoj de sinmortiginto, de Y. A. Pereira, tr. de A. Borges Gallego Soares el 19^a eld., Rio : Soc. Lorenz, 1998², 554 p. (ISBN 85 86984 01 9)

Ĉu eblas interreligia dialogo ?, de Nedžad Grabus, en *Spite al ĉio Bosnio : radio-elsendoj "Esperanto el Sarajevo"*, ELBiH, 1997, p. 111-112.

Valo de l'nebululo : Spiritisma romano, de Roque Jacintho, tr. F. Fonseca, Soc. Lorenz, 1996, 93 p.

Infanoj en la Transmondo, de F. Cândido Xavier kaj C. Ramacciotti, trad. de N. Pereira de Souza, Spirita Eldona Soc. Lorenz, 1995, 78 p.

Homaranismo, la Interna Ideo : Modesta komentario pri la interna ideo de Esper. laŭ la krento d-ro L.L. Zamenhof, de D. Pereira de Souza, prez. de Benedicto Silva, Soc. Lorenz, 1994, 81 p.

Stelo sur ŝtiparo (konkludo), de András Sütő, tr. de J. Kiss, en "Toleremo brulis sur Ĝeneva ŝtiparo" (*Literatura Foiro* n-ro 144, 1993, p. 212-216)

La lasta eliro, Fino de la Tempoj : 3^a Jarmilo, de Mauro Fonseca, trad. de Ruy de Albuquerque el la 6^a eld. port., Rio, Soc. Lorenz, [1993], 78 p.

Ateismo = sak-strato, de Ergoto de Bonaero, Buenos Aires : Argentina E-Instituto, 1991, 72 p.

La "lorno" por vidi Dion : Esoterismo, de Ergoto de Bonaero, Argentina E-Inst., 1991, 72 p.

Kosma filozofio de la Evangelio, de Huberto Rohden, tr. D. Pereira de Souza el la 2^a eld. portugallingva, Petrópolis : Soc. Lorenz, 1990, 194 p.

Kvazaŭ l'Arkeo de Noaĥo, de Ergoto de Bonaero, Argentina E-Instituto, 1990, 72 p.

Kio estas jogo ?, de Ergoto de Bonaero, en *Laŭte* (Beauville), n-ro 87 (3/4-1990), p. 23-27.

Feliĉoj kaj malfeliĉoj de l' kristanismo (laŭ "Mil jaroj de kristana filozofio" de Evaldo Pauli), de Edgard Jamart, en *Laŭte*, n-roj 83-87 (1989-90)

Spiritaj mesaĝoj, de Pietro Ubaldi, tr. de Walter A. Francini el la itala, Petrópolis : Spirita eldona Societo F. V. Lorenz, 1989, 44 p.

Se aŭskultas la animo...*: poemkolekto de Guido Gezelle, kun lia biogr., de P. Allossery (Konserv. de la G.-muzeo), tr. H. Vermuyten el la fl., Wilrijk : Sonorilo, 1987, 45 p. (ISBN 90 717652 11 4)

Ni vivos ! : Dokumenta dramo pri la lastaj jaroj el la vivo de Lidia Zamenhof, de Julian Modest, Budapest : Hungara E-Asocio, 1987², 53 p.

Monda humanismo : Internacia Humanisma kaj Etika Unuiĝo, Utrecht : IHEU, [post 1986], 8 p.

Internacia lingva komunikado en la eklezio kaj nuntempa mondo, de Georgo Korytkowski, Varsovio : PEA, 1986, 89 p. (ISBN 83 7013 020 8)

Kalevala*, de E. Lönnrot, tr. J. E. Leppäkoski, orn. A. Gallen-Kallela, postpr. de V. Setälä, Helsinki : EAF, 1985², 392 p. (ISBN 951 9005 51 X)

Kio estas la "Aŝta-siddhioj" ?, de s-ino Saranath, en *E-turismo en Oriento*, vintro 1984, p. 5.

La Kialo de l'Vivo, racia solvo de la problemo de l' ekzistado : Kio ni estas, de kie ni venas, kien ni iras, de Léon Denis, trad. Aff. Soares el la fr., Rio : Fed. Espirita Brasileira, 1982, 47 p.

La Prediko sur la Monto, de Huberto Rohden, tr. D. Pereira de Souza el 4^a eld. portugallingva, rev. D. Wranka, Rio : Soc. Lorenz, 1979, 151 p.

Einstein, la enigmo de la matematiko : Lia stranga agordo kun la mondoj de la magio, de la mistiko kaj de la jogo, de H. Rohden, trad. D. Pereira de Souza el la port., Rio : Soc. Lorenz, 1978, 130 p.

Bhagavad-Gita, tio estas, sublima kanto pri la senmorteco*, verse trad. de Francisco Valdomiro Lorenz el la sanskrita originalo, Rio : Federação Espirita Brasileira, 1975² (1^a eld. : 1941), 95 p.

Eduko kaj Vivsignifo, de Krishnamurti, enkonduko de Rubén Feldman Gonzalez, trad. de R.F. G. kaj K[ristian] B[audé], Laroque-Timbaut, 1970 kaj 1973, 22 p. (*La Juna Penso*, n^o 72 kaj 89 A).

Ni kaj Ĝi, eseoj III : Pri religio kaj arto*, de Gaston Waringhien, La Laguna : J. Régulo eld., 1972, 346 p. (ISBN 84 400 5989 2)

Nia historio : Kristana Esperantista Ligo Internacia de 1911-1961*, de H. A. de Hoog, antaŭparolo de past. A. Burkhardt, [KELI, 1964], 159 p.

Patro nia, de F. Cândido Xavier, tr. A. Soares el la port., des. de J. Linck, Soc. Lorenz, [s.d.], 97 p.